

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2011

12

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №12 (206)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 550 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №12 (206).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто. Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 14 ноября 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Zamenhof pri Homaranismo

En la 11a paĝo ni publikigas deklaron pri Homaranismo, kiun ĉi-jare subskribis sep personoj. Estas utile, antaŭ konatiĝo kun la nova deklaro, legi kelkajn subajn frazojn, kiujn Zamenhof verkis antaŭparole al Deklaracio pri Homaranismo, “speciala kaj tute difinita *politika-religia programo*”, en 1917 nur du monatojn antaŭ sia forpaso.

Sub la nomo “Homaranismo” (el la Esperanta vorto “Homarano”, kiu signifas: “Membro de la homa familio”) mi volas paroli pri strebado al “homeco”, al forigo de intergenta malamo kaj maljusteco kaj al tia vivmaniero, kiu iom post iom povus konduki ne teorie, sed praktike al spirita unuiĝo de la homaro.

Ĉar oni min konas kiel aŭtoron de la lingvo Esperanto, tial multaj personoj eble identigos la Homaranismon kun la afero de Esperanto; tio tamen estus eraro. Dum la esenco de Esperanto estas politike kaj religie absolute indiferenta kaj la interna Esperantisma ideo prezentas nur nedifinitan fratecan *senton* kaj *esperon*, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel, kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ilin, — la Homaranismo estas speciala kaj tute difinita *politika-religia programo*, kiu prezentas mian kredon pure *privatan* kaj la aliajn esperantistojn tute ne koncernas.

Sed se en rilato al Esperanto mia politika-religia kredo estas mia afero tute persona, en ĉiuj aliaj rilatoj ĝi havas en si absolute nenion personan. Tio, kion mi nomas “Homaranismo”, ne estas io nova, elpensita de mi persone; ĝi prezentas principaron, kiun — eble en malsama detala formo, sed proksimume en la sama esenco — jam de longe konfesis kaj konfesas en sia koro multaj homoj el ĉiuj tempoj, landoj kaj gentoj. Al tiuj homoj mi nun min turnas.

<...>

Oni ne intermiksi erare la Homaranismon kun la tiel nomata kosmopolitismo; oni ankaŭ ne pensu tute erare, ke, batalante kontraŭ la akre disiga genta dividiteco de la homaro, la Homaranismo volas mortigi la ekzistantajn lingvojn kaj religiajn kredojn. Kiel honesta patriotismo, instigante la civitanon strebi al plena unuanimeco kaj frateco inter liaj samlandanoj, tute ne malpermesas al li ami sian urbon pli ol la aliajn urbojn de sia lando, sian familion pli ol la aliajn, paroli hejme sian specialan dialekton kaj havi en sia koro sian privatan kredon, tiel la Homaranismo tute ne postulas de sia partiano, ke li forrifuzu sian tute naturan amon al sia patrujo, al sia gepatra aŭ eduka lingvo, sian fidelecon al sia religia kredo: ĝi postulas nur, ke li konservu ĉion ĉi tion *por si mem*, ke li ne altrudu siajn gentajn aŭ aliajn apartaĵojn al *aliaj* homoj; ke tion, kio malfeliĉe disigas la homojn, li ne rigardu kiel altan, ĉiuforte kultivindan *virton*: ke el siaj kvankam naturaj, sed tamen ja nur egoismaj preferoj li ne faru al si *idolon* nek batalan *standardon*<...>

Sur la kovropaĝo estas momento el eble la plej videbla esperantista agado en Ruslando — tradicia Lingva Festivalo en Ĉeboksary. Inter la kvardeko da lingvoprezentadoj estis prezentado de la japana fare de Aljona Trifonova. (*Fotis Irina Jakovleva*)

Esperanto estas multe pli valora ol speco de malangla aŭ identecofonto de supozata “popolo”

Mi kundividas plurajn elementojn el la interesa analizo de Trevor Steele (LOdE, №11), sed ne lian konkludan miksaĵon de iom da raŭmismo kun speco de milda finvenkismo celanta teni Esperanton viva ĝis la mondo maturiĝos por ĝi.

Ja veras ke antaŭ longe estis tempo en la historio de la tutmonda socio kaj ĝia lingva sistemo, kiam ankoraŭ eblis imagi iomajn ŝancojn ke konstruita interlingvo povus ĝui ĝeneralajn agnoskon kaj enkondukon kiel pli racia kaj justa ilo por plenumi la kreskantan bezonon je internacia lingvo. Inspirita de tiu nobla idealo, dum pluraj jardekoj multaj esperantistoj pene strebis atentigi la mondon pri ties “lingvoproblemo” kaj pri Esperanto kiel taŭga solvo por ĝi, bedaŭrinde kun tre limigitaj atingoj en tio.

Dume tamen, nek planite nek atendite, la mirindaj trajtoj de Esperanto mem kaj la intensaj agemo, kreemo kaj kunkonstruemo de la homoj vivigintaj ĝin sukcesis doni al la ĝenerala ideo “lingvo por internaciaj rilatoj” pli konkretan, fakte tute Zamenhofan enhavon, nome plej diversajn *interhomajn* rilatojn trans ĉiuj baroj.

Malgraŭ tiu etskala fenomeno, tra kompleksaj historiaj procezoj, ĉefe sed ne nur klarigeblaj per imperiisma lingvopolitiko kaj la tutmonda merkato de ĉio ekzistanta, estis la angla lingvo kiu iĝis pli kaj pli reganta en la uzoteroj kiujn la esperantistoj de antaŭaj generacioj kredis “nature rezervitaj” por la iam triumfonta Esperanto (scienco, komerco, turismo, ktp). Tiu evoluo, rapide akceliĝinta dum la lastaj du jardekoj, ja havas ege maljustan flankon, sed ĝi iĝis fakto de la nuna mondo kaj ties komunikteknologia revolucio.

Do, en tiel profunde ŝanĝiĝinta sceno, Grigorij Arosev (LOdE, №10) tute pravus je tio kion li diagnozas kiel “malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo”, laŭ la kriterioj kiujn la tradicia E-propagando antaŭe emfazis kiel ĉefaj allogaĵoj de nia lingvo (kontaktoj en aliaj landoj, ktp). Li ankaŭ agnoskas ke la homoj prave emas lerni pli utilan fremdan lingvon ol Esperanton.

Fronte al tiu nuna procezo, ĉe ni estas iuj kiuj opinias tiujn lernantojn de la angla nur pasivaj viktimoj de la cirkonstancoj aŭ malkuraĝaj submetiĝemuloj, kaj insistas ke la ĉefa ekzistokialo de Esperanto plu restas batali kontraŭ la

uzado de nacia lingvo kiel internacia lingvo (“hieraŭ la franca, hodiaŭ la angla, morgaŭ la ĉina”). La sole inda motivo subteni Esperanton estus do la morala respondeco rezisti la potencorilatojn kiuj nun privilegias la anglan lingvon.

Ja tiu David-kontraŭ-Goliata, epopea sinteno estas forte alvoka, sed mi timas ke per tio la plej radikalaj finvenkistoj fakte ŝarĝas la porEsperantan agadon per absurde tropostula eksterproportiaĵo, kies sola efiko verŝajne estas ŝajnigi nin marĝenaj kontraŭemuloj, strangaj defendantoj de malvenkinta iluzio, ne plu sencohava. Se ni emfazas tiun bildon de heroa rezistmilito kiel ĉefan motivon por lerni Esperanton (ĉar ĝi estus *la* sole vere inda por plenumi la rolon de internacia lingvo, male al la uzurpanta angla) ni plu fremdigos la ceterajn homojn disde nia tamen ja liberiga, emancipa fenomeno.

Esperanto ja estas ilo por ŝanĝ(et)i la mondon, sed eble ne tute precize laŭ tiu ekstreme ambicia programo, al kies venkoŝanco komplete mankas kredindeco. Multo estas jam atingita (eĉ se je modesta skalo), ke danke al Esperanto multe da bono okazis al konkretaj homoj en pluraj generacioj, tiel ke ĝi daŭre fascinas novulojn kaj trovas novajn terenojn, dum ĝi riĉigas la vivon de tiuj trovintaj ĝin.

Ĝuste la dogma misiemo ŝajne emas senvalorigi preskaŭ ĉion de la reala Esperanta vivo, ĉar ĉio tio (la amikiĝoj, la libroj, la muziko, ktp) estus aŭ kromefiko aŭ nura sinindulgemado, eble iom interesa sed ne la “vera” celo de Esperanto kaj do deflankiga, malŝpara de tempo kaj energio.

Ĉi-rilate, mi opinias ke la Manifesto de Raŭmo (1980) trafe kaj tre kuraĝe esprimis siatempe kritikon al iuj ne plu utilaj mitoj en la E-agado (dua lingvo por ĉiu / la angla lingvo estas nia malamiko / UN devas adopti Esperanton) kaj prave emfazis la indecon disvastigi Esperanton por realigi ĝiajn pozitivajn valorojn (sendiskriminaciaj kontaktoj inter ordinaraĵoj homoj, novtipa internacia kulturo, ktp). Ĉu tamen la vera raŭmismo havis la apenaŭan kulturflageman karakteron kiun atribuas al ĝi iuj finvenkistoj?

Mi konfesu ne multe interesiĝi pri iu supozate distinga, specifa Esperanta kulturo, sed pri la aspektoj tiel universalaj kiel plurece apartaj de la homara kulturo, kiuj ne hazarde ankaŭ trovas Esperanton



por sin esprimi. La milda tropo uzita en tiu manifesto pri la esperantaro kiel “mem elektita diaspora lingva minoritato” estas bela, sed povus esti miskomprenata kiel apartiganta nin disde la ceteraj homoj, kvazaŭ estus io esence speciala en la fakto esti esperantulo.

Lastatempe mi emas nomi “plivastismo” la reale ekzistantan sintenon kiun mi rekonas ĉe multaj esperantuloj (kiel mi mem). Temas pri homoj kiuj amas Esperanton, elvivus ĝin kiel gravan eron de sia vivo, opinias ĝin valorega praktika ilo de tuthomara, tergloba konscio sur/per la plej homa trajto (la lingvo), kaj eventuale provas diversmaniere kontribui al ĝiaj prestiĝo, videbligo kaj pluvivigo, ankaŭ de ties organiza branĉo (UEA, ktp). Samtempe tamen, malgraŭ la severa admono de iuj finvenkistoj, ili permesas al si ĝui la intense homigan rolon kiun Esperanto ludas en siaj respektivaj vivoj (per kultura kreado, intelekta stimulo, diversspecaj emocioj, egaleca amikiĝo kun aliaj homoj, alternativa ŝatokupo, ktp) kaj samtempe kelkaj el ili faras kion ili povas por malferme inviti aliajn homojn kunkonstrui tiun ĉi novspecan fenomenon kaj fari ĝin eĉ pli ampleksa, pli plureca, pli interesa. Oni sincere bonvenigas ĉiun ajn iniciaton iel ajn kontribuantan al la plivasteco de tio atingita de Esperanto, ekzemple, la esperantigo de sciencaj verkoj aŭ la kreskanta ĉeesto de esperantuloj en sociaj retoj kiel Facebook. Temas pri sinteno kiu atribuas valoron al ĉio ajn kio jam nun helpas pligrandigi kaj pliriĉigi nian mondeton Esperantujo.

Kiel tre speciala homa kaj fakte homiga iniciato, la motivoj okupiĝi pri Esperanto evoluas kaj estas plurecaj, kiel ĉio homa.

José Antonio Vergara

Sukcesa kongreso en Barcelono

Spite al la financa monda krizo kaj al la nefavora veterprognozo la 35a Kataluna Kongreso de Esperanto sukcese okazis en la kataluna ĉefurbo Barcelono de la 28a ĝis la 31a de oktobro.

Kvankam temis pri nacia kongreso, la ĉeestantaro estis sufiĉe multnacia: preskaŭ 140 aliĝintoj alvenintaj el la kongreslando kaj dek unu aliaj landoj.

Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) starigis en siaj agadprincipoj konstantan engaĝiĝon en la kataluna socio, kion nia nacia kongreso klare respegulis. Antaŭ la kongreso estis dissenditaj rete informoj al la enlanda ĵurnalaro, kaj okazis katalunlingva prezento de la kongreso en la sidejo de Omnium Cultural — asocio por defendo de la katalunaj lingvo kaj kulturo. Dum la kongreso okazis prelegoj katalunlingve pri Esperanto, la koncertoj estis malfermaj al neesperantistoj... Pro tio ni ricevis reeĥon en komunikiloj: tuta paĝa artikolo en la alternativa semajngazeto *La Directa*, elsendo ĉe la loka televidstacio BTV, mencio en la plej aŭskultata radistacio RAC1, kaj favora dupaĝa artikolo en la dimanĉa eldono de la ĵurnalo *ARA* (vidu ĉi-sube).

Malfacilas la tasko raporti pri ĉiuj eroj de la kongreso, kiu estis enhave varia kaj okazis diversloke tra la urbo kaj eĉ ekster ĝi, sed jen rapida laŭtaga resumo de la kongreso:

Vendrede la afero komenciĝis posttagmeze, dum kelkaj amuziĝis lernante popoldancojn kun Mon Cardona, aliaj povis sekvi la katalunlingvan prelegon de Ramon Rius: “Kial Esperanto estas tiom altira”. Jam en la nokto kongresanoj kaj eksteruloj povis spekti la koncerton de Vera Girard kaj JoMo.

La sabato estis la plej densa kongresotago: kun ioma mediteranea prokrasto okazis la inaŭguro kun partopreno de la familianoj de nia pioniro Jaume Grau Casas kaj de magistratano de la urbeto Subirats kiu invitis nin postkongresi tie.

Tuj ekis la prelegoj, kaj la embarasa elekto ĉu aŭskulti la prelegon de Zlatko Tišljar pri lingva politiko en Eŭropa Unio, rekte ligita al la kongresa temo aŭ artismumi? Tiukaze denove oni devis decidi ĉu aniĝi al la korusa ateliero de Carles Vela aŭ al la poezia komisiono de la genia vortĵonglisto Jorge Camacho?

Tuj poste Katalin Kováts prelegis pri io tre persona, la lingva edukado de sia filo en multlingva medio kaj la malfacilaĵoj kiujn ŝi nekredeble spertis en la, nur ŝajne internacieca, nuntempa Nederlando. Samtempe Kevin de Laet rakontis pri la lingva politiko en Belgujo.

En la lasta triono de la matena programo eblis elekti inter prelego pri poezio de Jorge Camacho, la talismanoj de Abel Montagut aŭ katalunlingva prelego de Jordi Solé pri la elstara verkaro de Delfi Dalmau.

Post la tagmanĝa paŭzo la aktivuloj de KEA laborkunvenis, tiuj de KEJ asembleis, dum la aliaj kongresanoj disiĝis por ĉeesti diversajn prelegojn. Eblis elekti inter prelego de Abel Montagut pri Jules Verne aŭ la prezento de la strategio de Eŭropa Esperanto-Unio far Zlatko Tišljar.

Tuj poste nia verva Boris Mandirola prezentis TEJON al junularo, dum Rubeno Fernández elstare prelegis pri lingvistiko el ege filozofia vidpunkto. Katalin Kováts rakontis pri la aktualega Esperanto-instruado pere de la reto kaj samtempe ronda tablo okupiĝis pri lingva diverseco en EU.

Nokte kongresanoj kaj eksteruloj povis ĝui la koncerton de *Kaj Tiel Plu*.

Dimanĉe la kongreso malkongres-ejis, buso portis kongresanojn al la tombejo de Montjuïc. Tie kuŝas la restaĵoj de kelkaj miloj da viktimoj de faŝismo dum nia civila milito kaj la sekva frankisma diktaturo. Tie ni omaĝis ĉiujn internaciajn brigadanojn, inter kiuj ankaŭ troviĝis esperantistoj. Meto de florbukedo kaj ludado de *Kanto de la birdoj* far Ferriol Macip kolofonis la plej kortuŝan eron de nia kongreso.

Posttagmeze nia historiisto Dani Cortijo gvidis nin tra la malnova Barcelono, li malkovris por ni nekonatajn faktojn kaj senvualigis misterojn kaj mensoĝojn de la historio de la kongresa urbo.

La kuna piedirado portis nin ĝis la kafejo Horiginal, tie ni sidiĝis en aparta salono kie triope starantaj korusanoj mute ĉirkaŭis nin, subita mangesto de Carles Vela, kaj la voĉoj envolvis la tutan salonon kaj majstre karesis niajn orelojn. Bonega komenco por ĉarma korusa koncerto dum kiu alterne kantis TutPEKo, Cor Acord kaj la kongresanoj kiuj sekvis la kongresan atelieron. Post la vespermanĝo la iberia bardo Jorge Camacho gvidis la poezian vesperon.

Se temas pri poezio oni pensas pri skribitaj poemoj sed ankaŭ ekzistas la buŝa poezio kaj en la vespero oni ĉeestis la amikan duelon inter Xabier el Eŭskio kaj Ferriol el Katalunio, kiuj disputis en poeziimprovizado.

Lunde Jorge fingvidis la poezian komisionon, Boris prezentis la laste fonditan Nitobe-asociacion, Zlatko faris la konkludan prelegon kaj lanĉis defion por la katalunaj esperantistoj, kadre de la centjariĝo de la naskiĝo de Tibor Sekelj traduki katalunen lian plej popularan verkon: *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*.

La kongreson oni fermis per komuna adiaŭa tagmanĝo en la kafejo Horiginal. Post paperaviadila batalo inter la tagmanĝintoj ni forlasis la restoracion, tamen la grupo ankoraŭ ne disiĝis definitive. La LKK kreis novan koncepton en la E-kongreso: “antaŭpostkongreson”. Denova enurba vojaĝeto ĝis la kultura centro Tradicionarius, tie ni okazigis kaŝtanfeston.

Marde, dank’ al la kunlaboro de la asocio “Amikoj de la Muzeo” kaj de la urbestraro de Subirats okazis la postkongreso en Sant Pau d’Ordal (municipo de Subirats) kie situas la Esperanto Muzeo fondita de Lluís Hernández Izal. Post la interesa vizito okazis kuntagmanĝo kiu definitive fermis la kongresan aktivadon.

Alfons Tur



Amikeco trans la maro

La serenan posttagmezon de la 7a de oktobro, en trejneja instanco inter montetoj en urbo Seongnam, sude de la korea ĉefurbo Seulo, iom post iom amasiĝis koreoj, kaj vespere, du busoj da japanoj aldoniĝis. Jen la komenco de la 43a Korea Kongreso de Esperanto por koreoj, la 98a Japana Esperanto-Kongreso por japanoj, sed ili ja celas la Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio. Ĝi estas la frukto de la projekto, koncipita antaŭ du jaroj, kaj estis preparita, ĉefe per interreta kontakto, de la Tegmenta Komisiono por la Komuna Kongreso (TEKO), kiu kunigas ambaŭ landajn organizantojn. Mi, kiel unu el la TEKO-anoj, priskribos la kongreson.

Entute, ni havis 500 aliĝintojn (pli ol raportite en la novembra *Ondo*), el kiuj 342 el Japanio, 147 el Koreio kaj 11 el aliaj landoj. Efektivaj ĉeestantoj estis ĉ. 300. La tuto de la aranĝoj, loĝado kaj manĝado okazis en la Centra Trejnado-Instituto de Korea Saemaul-Movado. Multaj dormĉambroj estas laŭ la korea planka konstruo. Samtempe kaj samloke estis la 30a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea Junularoj (KS), kun kiu estis la komunaj solenoj Malferma kaj Ferma.

Nu, mia plumo denove iru al la 7a vespere. Ni TEKO-anoj, post la unua kunsido vizaĝ-al-vizaĝa vizitis la ŝtuparitan lekciejon, jam estis Interkona Vespero. Tie estis muzikoj, pup teatraĵoj ktp, kaj fine oni amuzis sin per karaokeo.

La 8an matene, ĉe la Malferma Soleno, la reprezentantoj de la tri organizoj salutis, nome mi el Japana Esperanto-Instituto, Park Wha-Chong el Korea Esperanto-Asocio, kaj Jung Eun-Kyung el Korea Esperanto-Junularo por KS. Poste sekvis festparoladoj ktp. Bedaŭrinde, vjetnama invitito ne povis veni pro viza problemo. Estis prelegoj, i.a. de Gotoo Hitosi, pri japana esperantisto Ooyama Tokio, en la tempo kiam Koreio estis aneksita al Japanio. Paralele okazis fakkunsidoj kaj propraj programoj de KS. Inter la fakkunsidoj estis tiuj de SAT kaj ILEI, internaciaj organizaĵoj; estis la unua ŝanco por la membroj de SAT kaj de ILEI, ke du-lande la membroj interkonatiĝas.

La vespermanĝo de tiu tago, en la sama trejneja manĝejo, estis iom luksa. Anstataŭ kutimaj pladoj de rizaĵo, supo kaj tri kuiritaĵoj, estis diversaj specialaĵoj, ankaŭ suŝioj, kukoj kaj fruktoj. Poste oni ĝuis la Festan Vesperon. Tie koreaj



TEKO organizis modelan dulandan kongreson kaj ricevis aplaŭdojn en la Ferma Soleno.

dancistinoj regalis nin per la tradiciaj dancoj, kaj sekvis teatraĵetoj. Unu el ili, *La rakonto de Chung-hyan* de la korea grupo KTP, estis ludita ankaŭ de japana KTP-ano Kawanisi Teturo, unu el la TEKO-anoj.

La 9an antaŭtagmeze daŭris fakkunsidoj, i.a. pri la manĝokulturoj ambaŭlandaj. Posttagmeze, en la Ferma Soleno, estis premiadoj japanflanka kaj koreflanka, plus tiu de la literatura konkurso, en kiu 2 japanoj kaj 1 koreo estis premiitaj. La simbola verdstela flago estis transdonita, koreflanke al la membro de Seulo, japanflanke al la membro de Hokajdo, kie okazos la venontjaraj kongresoj. La kongreso estis finita de la kanto *La Tagiĝo*, gvidita de la fakkunsidintoj de la Korusa Fakkunsido.

Post la fino pli ol cent kongresanoj, ĉefe japanoj, havis ekskurson al la urbo-centro de Seulo, gviditaj de koreaj samideanoj. La KS-anoj havis sian propran ekskurson. Multaj koreoj forlasis la ejon en tiu dimanĉa vespero, sed pli ol cent japanoj ankoraŭ tranoktis. Ĉirkaŭ cent japanoj havis postkongresan vojaĝon la 10-11an de oktobro, gvidite de koreaj samideanoj kaj profesiaj ĉiĉeronoj parolantaj la japanan lingvon. La celo de la vojaĝo estis transpasi la Korean Duoninsulon kaj viziti la Orientan Marbordon kaj la monton Sorak.

Jen aparte pri presaĵoj. Krom la Kongresa Libro (kies ĉefa parto brajle presita), japanflanke oni eldonis, monaton antaŭ la kongreso *Trilingvan Interparoladon* en KD kaj broŝuro — nome frazoj en Esperanto, la japana kaj la korea, kaj disdonis al ĉiuj aliĝintoj. Koreflanke, oni eldonis kaj vendis la libron *Esperanto kaj mi*, en la korea kaj Esperanto, pri voĉoj de samideanoj pri sia esperantista vivo.

Resume, mi supozas, ke la komuna kongreso sukcesis “mal-krokodiligi japanojn / koreojn” kaj la celo de la temo, “Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro” estis bone atingita.

Sibayama Zyun'iti

Fukuŝima: kuraĝiga kongreso

En la varmfontejo Iizaka en la urbo Fukuŝima 22-23 okt okazis la 52a Toohoku Esperanto-Kongreso (Toohoku estas la norda parto de la Honŝuu-insulo en Japanio). Oni timis, ke pro la radioaktiveco venos malmultaj homoj, sed preskaŭ 50 homoj ĉeestis kaj pliaj 30 morale aliĝis.

22 okt en la simpozio “Esperante pacon por protekti vivon kaj vivadon” reprezentantoj de la kvar gubernioj de Toohoku raportis pri la katastrofo en sia gubernio, kaj poste ni diskutis. Oni konkludis, ke ni malhavu nukleajn centrojn en Japanio, kaj ke en la nuna kriza situacio Esperanto helpas nin multe kiel trezorejo de esperoj. Vespe en Gaja Vespero talentuloj montris teatraĵon, kantis Esperanto-kantojn kaj deklamis siajn poemojn, kaj ĉiuj gaje manĝis kaj trinkis.

Sekvatage prof. Goto Hitoŝi prelegis pri la temo “Toohoku kaj lingva kulturo de Esperanto”, en kiu li prezentis homojn el Toohoku, kiuj ludis grandan rolon en la evoluo de Esperanto-kulturo en Japanio. Post la kongreso 20 homoj promenis en la urbeto Iizaka, vizitante malnovan domon de la familio Horikiri.

La venontjara kongreso okazos en la gubernio Mijagi. La kongreso estis tre sukcesa kaj tio kuraĝigis esperantistojn en Toohoku.

Hori Jasuo



LF en Ĉeboksary: danco kun kastanjetoj en la Internacia Vespero (Fotis Irina Jakovleva)

Ĉeboksary: Sukceso, sed ne plena

La 27a Rusia Esperantista Kongreso, okazinta en Ĉeboksary 20–23 okt 2011, pasis sufiĉe sukcese, kaj samtempe ĝi estis interesa sperto. La unuan fojon en la landa historio kongreso estis samtempigita kun lingva festivalo (LF) — unu el plej gravaj neesperantlingvaj aranĝoj, kiun tradicie okazigas esperantistoj. Apartan guston aldonis la fakto, ke laŭinforme ĝuste en Ĉeboksary naskiĝis la ideo de LF. Notindas, ke REK pli frue jes okazis samtempe kun aliaj E-aranĝoj (kun la arta festivalo EoLA).

La du antaŭaj REKoj okazis en la nord-okcidenta parto de la lando (en Sankt-Peterburgo kaj Tiĥvin), do la ideo estis doni eblecon kongresi al alia regiono, nome Ĉevolgio. Tial estis atingita interkonsento kun Junulara Esperanto-asocio de Ĉuvaŝa respubliko pri okazigo de REK-27 tie.

Ne ĉio estis simpla dum la preparado, sed la kongreso okazis. Precizan kvanton de partoprenantoj oni ne povas menci, ĉar, kiel dirite, la du aranĝoj pasis samtempe kaj kelkaj esperantistoj (specife temis pri lokanoj) vizitis ne ĉiujn aranĝojn. Sed, malprecize dirante, estis ĉirkaŭ tridek partoprenantoj el deko da landpartoj. Estis prezentitaj ne nur centraj kaj proksimaj regionoj, ekzemple, venis tripersona delegacio el Novoĉerkassk (Rostova regiono). Tiuj esperantistoj estas aparte salutindaj, ĉar ili nur ĉi-jare kreis sian klubon kaj jam aktive vizitas Esperanto-renkontiĝojn.

La programo konsistis el ĉi-sekva partoj: la ekskursi (oni vizitis ĉeboksarajn muzeojn, kaj krome estis aranĝita busa-pieda ekskurso tra la urbo), la lingvofestivala (krom LF mem oni

vizitis ankaŭ studentan lingvan konkurson, kiu tradicie okazas ĉiufoje vendrede — LF kutime startas sabate), la distra (okazis du koncertoj) kaj la movada (konferenco de REU).

La plej grava manko estis ja malalta kvanto de partoprenantoj. Unuflanke tio estis antaŭvidebla, ĉar Ĉeboksary estas ne tre facile atingebla el aliaj urboj, sed aliflanke oni povis esperi, ke apude loĝantaj esperantistoj deziros partopreni kaj venos. Bedaŭrinde tio realiĝis ne plene, kaj parton de respondeco pri tio sendube prenas la organizantoj pro nesufiĉe aktiva reklamado kaj informado pri la kongreso, kio estas aparte domaĝa, ĉar la kongreso mem rezultis interesa kaj bone organizita el la teknika vidpunkto (dankon al ĉeboksaraj esperantistoj).

La konferenco de REU, okazinta kadre de la kongreso, elektis novan estraron, kiun plu prezidos la aŭtoro de ĉi tiu artikolo, krome la gvidorganon eniris alfabetorde Irina Gonĉarova (Moskva reg.), Jurij Karcev (Uljanovsk), Arina Osipova (Jekaterinburg) kaj Svetlana Smetanina (Moskvo).

La sekva REK okazos en 2013 plej verŝajne en Vladimir; ĝusta decido ankoraŭ ne estas akceptita.

Grigorij Arosev

Omaĝo al Ismael Gomes Braga

“Tre bona evento!” — estis la opinio de la plimulto inter la 72 ĉeestantoj pri la 10a Spiritista Esperantista Renkontiĝo (SER), okazinta 11 sep 2011 en Rio-de-Janeiro.

Paulo Andrade dos Santos dum unu horo parolis pri la ĉefa temo: “La 120-jara naskiĝdatreveno de Ismael

Gomes Braga”, kaj poste li dum 20 minutoj respondis demandojn de la ĉeestantoj.

En la arta programo la ĥoro de la spiritisma domo Leon Denis prezentis Esperantan kaj popolajn muzikojn. Gelnantoj de la Esperanto-grupo Lazaro Luiz Zamenhof deklamis dulingve la Zamenhofan poemon *Preĝo sub la Verda Standardo*. Sinjorino Margareth deklamis dulingve la poemon *Aŭdi Ste-lojn* de Olavo Bilac, kaj, same dulingve, Sinjoro Benedito deklamis la poemon *Sekreta Malbono* de Raimundo Correa — ambaŭ poemojn esperantigis prof. Daltro Santos. Inter la artaj programeroj Paulo Kverko diskonigis pilolajn informojn “Ĉu vi scias?” pri enlanda kaj eksterlanda movado.

Fine ĉiuj kunkantis *La Esperon* kaj pozis por la oficiala foto de la renkontiĝo. La 11a SER okazos 9 sep 2012 kun la ĉeftemo “La 140a naskiĝdatreveno de Francisko Waldomiro Lorenz”.

Paulo Kverko

Renkontiĝo sen tedaj prelegoj

En la ĉarma apudmara brazila urbo San-Vicento, proksime de San-Paŭlo, 22–23 okt okazis neordinara Esperanto-renkontiĝo.

Esperanto estas relative facila lingvo, sed kutime veteranoj igas ĝin malfacila. Estas multaj tekstoj en Esperanto, kiuj eĉ, se ni tradukus ilin al nia gepatra lingvo, restus malfacile kompreneblaj. Pro tio komencantoj kaj komencintoj ne ĉiam konsentas ke Esperanto estas vere facila, kaj multaj el ili forlasas la lernadon.

En nia renkontiĝo, anstataŭ la kutimaj altnivelaj prelegoj, sed tedaj por la komencintoj, ni faris programerojn, kiuj postulis la partoprenojn de la ĉeestantoj per kontrolita lingvo-nivelo. Ni petis al niaj prelegantoj antaŭe kontroli la tekstojn de siaj prelegoj per speciala versio de esperantilo, uzata de Facila Vento www.facila.org.

Per tiu facila lingvo-nivelo la komencintoj povis ne nur spekti, sed vere partopreni la aranĝon, kaj tio multe entuziasmigus ilin daŭrigi la lernadon. Dum du tagoj, ĉirkaŭ 60 homoj parolis Esperanton. La aktivecoj okazis ne nur en la bela salono malferma al la natura arbaro, sed ankaŭ apud la plaĝo, en restoracioj, kaj en drinkejoj. Uzi la lingvon en publikaj lokoj, estas la plej bona reklamo por nia lingvo.

Emilio Cid

Jarcento de Esperanto en Seviljo

En la belega urbo Seviljo 21–23 okt okazis unu el la plej gravaj Andaluziaj Esperanto-kongresoj kune kun festado de la centjariĝo de Esperanto en Seviljo. Pli ol 50 homoj aliĝis, kaj inter ili mi mencias kelkajn, kiuj riĉigis la programon per interesaj paroladoj kaj atelieroj.

Rafaela Urueña, emeritiĝinta profesorino pri Internacia Juro, prelegis pri “La graveco de la protektado de la medio”, kaj klarigis al ni multajn dubojn pri problemoj de la medio kaj eblaj solvoj. Antonio Rodríguez Gash, klimatologo, laborulo de Andaluzia Televido, prelegis detale pri Sevila Esperanto-Asocio (SEA) kaj ĝia historio dum cent jaroj. Rafael Mateos emerita lingvoinstruisto kaj tre agema esperantisto, kiu dum la lastaj ses jaroj instruis Esperanton en publika biblioteko de Onubo (Hispanio), en Kastelo Greziljono, en Hungario, Ukrainio kaj Ĉinio, parolis pri *La lingva instinkto* de Steven Pinker. La tradukisto Jorge Camacho, kiu dum dek jaroj membris en la Akademio de Esperanto kaj tradukis kaj verkis kelkajn librojn, kaj kiu nuntempe kunredaktas *Beletra Almanako*, prelegis kaj gvidis interesan atelieron “Kiel poemi kaj deklami poezion”. José María Rodríguez Hernández, juristo kaj redaktoro de *Gazeto Andaluzia* kaj *Internacia Juro*, kaj sekretario de AEU, prelegis pri la historio de la Andaluzia Esperanto Unuiĝo (AEU). Li estas kunfondinto de ĉi asocio en 1983 kaj sindonema esperantisto, kies valoron agnoskis la membroj de AEU kaj ĉi-jare oni decidis premii lin per memor-tabulo, kiun li ricevis dum la kongresa bankedo.

Kompreneble, en ĉiuj kongresoj oni ĝuas ekskursojn kaj promenadojn, kaj Seviljo estas loko por longe promeni, ĉefe tra la juda kaj mezepoka kvartaloj. Antonio Rodríguez Gash, sevila spertulo pri la urbo, gvidis la grupon tra mallarĝaj sed belegaj stratoj rakontante detale pri eventoj kaj artaj konstruaĵoj. En Seviljo staras la dua plej granda gotika katedralo en la mondo, La Giralda, kaj la dua plej grava artmuzeo en Hispanio kun verkoj de Murillo, Velázquez, El Greco, inter aliaj nombraj monumentoj kaj konstruaĵoj.

Ankaŭ ni ĝuis belan filmon en Esperanto, faritan de la Madrida Liceo de Esperanto en 1980, kaj projekciadon de fotoj pri la historio de Esperanto en la urbo, fotoj aperantaj en la verko *Cent jaroj da Esperanto en Seviljo*, kies



Seviljo: La Esperanto-trinkaĵo el Katalunio estis vere gajiga.


aŭtoroj estas Antonio Rodríguez Gash kaj Juan de Dios Montoto.

SEA regalis la ĉeestantojn per bongusta fritita fiŝo en alloga restoracio apud la rivero Gvadalkiviro. La deserto konsistis el bongusta torto desegnita per Esperantaj motivoj, kaj por fini la feston, ni tostis per *Cava Esperanto*, trinkaĵo produktita en Katalunio.

Dimanĉe ni ĝuis bongustan ĉokoladon kun tipaj kukoj en la alloga kaj tipa Flamenka Rondo “Pies Plomo”, kie ni daŭrigis la kongreson per prelegoj kaj amuzaj babiladoj, la ĉefa temo estis AJEU, juna grupo de Andaluzio kaj anekdotoj pri la historio de Esperanto en Seviljo. La kulmino de la kongreso estis koncerto en la monaĥinejo Santa Rosalía, kie ni ĝuis belegan klasikan muzikon kaj fine fragmenton el *La Espero*. Poste, kelkaj grupetoj sub suna ĉielo faris la lastan promenadon kaj tagmanĝis en restoracioj de la urbo. La sekva andaluzia kongreso okazos en la historia urbo Ronda, kaj de nun ni laboras por okazigi fruktodonan kongreson.

Ángel Arquillos

La memortabulo omaĝe al Josef Hradil (1924–2008) en Skokovy (*Fotis Miša Filip*)



Esperantistoj denove en *Espero*

La radicia 33a lingva seminario okazis denove en la pensiono *Espero* en la malgranda ĉeĥa vilaĝo Skokovy en la distrikto Mladá Boleslav 10–16 okt 2011.

La partoprenantoj venis kun riĉaj kontribuadoj, kaj danke al nia gasto Nicol el Francujo ĉiuj konstante uzadis nur nian lingvon.

Oni kreis tri grupojn por laboro antaŭtagmeze. La unua vespero estis dediĉita al raportoj pri novaĵoj post la printempa seminario. Marde parto da partoprenantoj veturis al Mladá Boleslav por la prelego de doktoro Kašparů en Universitato de la Tria Aĝo pri “Nuntempa familio kaj ĝiaj problemoj”. La salono estis plenplena kaj demandoj estis trafaj. Por danki la preleganton, kantis tri virinoj el loka ĥorondeto spiritajn popolajn kantetojn kun temo bone konvena al la prelego. La etoso estis vere agrabla. Vespere la geedzoj Dvořák revenigis nin al la UK en Kopenhago, kaj ankaŭ ili rakontis kun filmeto pri muzikfesto en Italujo, kie partoprenis du niaj esperantistinoj.

Merkrede ni solene senvualigis tabulon ĉe la enirejo de la pensiono, memore al nia kara doktoro Jozefo Hradil, la aŭtoro de la *Medicina terminaro*. La tabulon kreis nia ano Zdenek Myslivec el Bozkov. Malgraŭ malbona vetero venis multaj homoj, inkluzive de ĵurnalisto kaj lokaj urbestroj. Vespere Jaroslav Pokorný rakontis pri lokaj botanikaj interesadoj, ŝtonoj, likenoj kaj muskoj. Ni restis kun li ĝis vera noktomezo.

Ĵaŭde ni diskutis, sed ĉefe okazis “Seĝo por nia gasto”. Mirka Ascherová rakontis pri sia libertempo sur la insuloj Maŭricio kaj Reunio kaj ni povis vidi 500 fotografaĵojn per komputilo.

Vendrede prelegis Margit Turková pri sia meritplena agado “haŝekologia”, kiel esperantistoj helpadis traduki la mondfaman libron de Jaroslav Hašek *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*.

Sabate la aŭtoro de ĉi tiu artikolo rakontis pri la “Avulino el Skokovy” — loka naturkuracisto, kiu mortis en la jaro 1923. La organizantoj ĝustatempe invitis pere de vilaĝoficistoj lokanojn partopreni posttagmeze okupadojn por manlabori memoraĵojn kaj ornamaĵojn por Kristnasko.

La venonta seminario okazos 16–22 apr 2012, ĉiuj estas invitataj.

Jindřiška Drahotová

Course-You-Can

Je la vendreda vespero de la 21a de oktobro en Barlastono ĉe la centro de la Esperanto-Asocio de Britio komenciĝis la semajnfina porkomencanta kurso Course-You-Can. Unue estis la vespermanĝo kaj konatiĝo kun la aliaj studentoj kaj la instruisto, Malcolm Jones. Poste okazis la unua leciono.

Ni uzis teatraĵetojn el la infana kurso *Springboard* kaj ĝoje ŝajnis nin esti ranoj, ursoj, musoj kaj diversaj aliaj bestoj. Sed ne estis nur ludoj: Malcolm lernigis al ni la bazan gramatikon, kiun ni ekzercis per multaj ekzercoj. La kurso estis precipe buŝa. Mi trovis la intervjuojn aparte utilaj, laŭ kiuj ni demandis, unu al la aliaj, koncerne personajn detalojn kaj skribis raportojn pri la alia homo por poste voĉlegi al la grupo. Ni aŭskultis kanton kaj penis skribi la vortojn de la kanto. Ĉi tion mi trovis ege malfacila.

La kurso estis tre interesa, la loĝigo estis tre komforta kaj la manĝaĵo tre bona — nun mi devos perdi la kilogramojn, kiujn mi gajnis!

Ron Cufley

Grupete kaj pare laŭ Lungomare

La 3a MEVO (Marborda Evento), nord-adriatika ripoziga kaj kulturturisma kunestado okazis 14–16 okt en Opatija kaj Lovran, la pionirurboj de la kroata turismo kaj ĝiaj daŭraj ĉampionoj.

La belvetera semajnfino ebligis agrablan tritagan partoprenon en kultur-gastronomia manifestacio, la tradicia 38-a “Marunada” en Lovran, dediĉita al la konataj lovranaĵoj maronoj. Des pli la sunaj tagoj logis la ekskursantojn al la jubileanta Lungomare — bela 100-jara apudmara promenejo — por plurhoraj

promenoj laŭ ĝia 12-kilometra vojo, plena de spirhaltigaj belvidejoj.

La MEVanoj multe ekskursis, naĝeĵis, kafeĵis, kukeĵis... kune, memstare, grupete, pare...

La 4a MEVO okazos dum la venontjara marta/aprila semajnfino, antaŭ IJF en Italio kaj Mezorianta Kunveno en Turkio, kien eblos kunvojaĝi per helpo kaj konsiloj de Orbis Pictus, la organizanto de la Marbordaj Eventoj.

Viŝnja Branković

Kia estonteco en Svedio?

En la sveda kooperativo Esperantogardeno 28–30 okt 2011 okazis renkontiĝo, kiu diskutis gravajn demandojn pri la estonto de la Sveda E-Movado kaj de la Esperantodomo.

Al Lesjöfors meze de Vermlando inter lagoj, montetaj eĝoj kaj arbaroj venis nur sep samideanoj, spite al la penado de la estraro fari allogan programon kun la naturkuracisto Harald Schicke el la Esperanto-urbo Herzberg kaj Stella Lindblom.

La prelegon de d-ro Schicke partoprenis ankaŭ lokanoj. La prelego temis pri la naturkuracado en Germanio, compare kun la preskaŭ neekzistado de tio en Svedio. Dimanĉe Harald prelegis pri alta sangopremo kaj kolesterolo. Stella Lindblom, kiu loĝas en Vermlando kaj estas (preskaŭ) denaska esperantisto, demonstris per piedbanujo kiel forigi venenojn el la korpo.

Krom la sep aliĝintoj estis pliaj 11 personoj: la prizorgintoj de la programo, helpanto, estraranoj kaj dommastro. Do entute ni estis 18. La jarkunsido de la Esperantodomo elektis novan estraron, kiu havas grandajn taskojn antaŭ si.

Wim Posthuma

La sesa ĝemelurba feriosemajno

De la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2011 okazis la sesa Somera Arbara Lernejo (SALO 6) kun gelernantoj el la ĝemelurboj Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo en Germanio kaj Góra en Pollando. Denove oni renkontiĝis en la bela vilaĝo Sieber en la Nacia Parko Harz. La vilaĝo apartenas al la urbo Herzberg.

Dudeko da gelernantoj kun kvin instruistinoj komune pasigis memordinan semajnon. Krom ludoj, dancoj kaj lernado de Esperanto okazis belaj ekskursoj. La vicurbestro Wolfgang Weippert akceptis la gejunulojn en la konsilantara salono de la urbodomo kaj faris interesan lando- kaj lingvo-kvizon kun la partoprenantoj. Li emfazis la gravecon de Esperanto kiel komuna neŭtrala interligilo.

Teresa Sibilak kaj Renata Kowalska prizorgis la gelernantojn el Góra. Zsófia Kóródy instruis Esperanton ĉiutage kaj organizis tutagan programon, gvidis la komunajn aktivadojn, informis pri la diversaj eventoj. La studentino Judita kaj la instruistino Ewa Kukielka helpis honorifice kaj transprenis instruadon de malgranda grupo de progresantoj.

En Herzberg ili komune rondrigardis la urbon, promenis al la kastela muzeo por rigardi la novan Esperanto-ĉambron. Okazis ekskurso al la alternativa bieno Herbigshagen apud la urbo Duderstadt kaj al la plezurparko Pullman-City, kie la gejunuloj “lavis oron” en rivereto kaj vizitis indianan vilaĝon.

Dum la eventoriĉaj feriotagoj ne mankis sportaj eventoj kaj naĝado en la naĝejo apud la libertempa parko kun multaj ludeblecoj. La migrado sur la monton Großer Knollen (Granda Bulbo) plaĉis al ĉiuj. Ili surgrimpis turon kaj ĝuis unikan panoramon al la montoj kaj valoj en la sudharza regiono. La infanoj kaj gejunuloj el ambaŭ landoj amikiĝis kaj plu tenos la kontaktojn per la nuntempaj retkomunikiloj.

En la antaŭlasta vespero okazis kradrostadfestado en Sieber. Venis multaj parencoj kaj geamikoj, eĉ alvenis la vilaĝestro Ahlborn, kiu bonvenigis la ĉeestantojn. La 10an de aŭgusto 2011 venis la urba buseto de la komunumo Góra kaj hejmenveturigis la geamikojn al Pollando. La sesa komuna feriosemajno verŝajne okazos dum aŭgusto 2012 en Góra (Pollando).

Zsófia Kóródy

Sur la foto: Polaj kaj germanaj gelernantoj apud la Esperanto-domo en Herzberg. (Foto de ICH)



LF: Unuafoje por lernejanoj

En la 5a Pedagogia kolegio en Moskvo 30 okt okazis la 1a Moskva Lingva Festivalo por Lernejanoj (MLFL).

Pro manko de granda ejo por la kutima Moskva LF, la organizantoj (EK MASI) staris antaŭ elekto: tute ne okazigi la festivalon ĉi-jare, aŭ okazigi pli malgrandan version. Aliĝo de 42 lernejanoj el la urbo Kaluga donis la solvon — lingva festivalo por lernejanoj!

Dum la festivalo estis prezentitaj 34 lingvoj (el kiuj 11 dufoje, Esperanto trifoje) kaj dek prelegoj. La diapazono estis vasta: de popularaj (kiel la hispana kaj japana) ĝis nekonataj (kiel la afrika jaure) kaj formortantaj (kiel la liva), de la antikvaj (kiel la antikva rusa) ĝis la junaj (kiel la novhebrea). Senkonkurence kiel planlingvo solis Esperanto.

Kiel kutime, la esencan programon kadris la Solena Malfermo kun kelkaj koncertoj kaj la Solena Fermo, kiu laŭ si mem estas fakte la Koncerto. Ambaŭ pasis bonege. Speciale indas mencii la anoncaranĝadon de la ferma koncerto, organizitan kiel vojaĝo de Elli-Dorothy al la sorĉisto en la lando Oz. Ĝi estas unu el la meritoj de la nova MLF-teamo, pri kiu nepras diri almenaŭ kelkajn vortojn.

MLFL estis realigita de la draste renovigita teamo, kiu kreigis post la Eŭropa Tago de Lingvoj en la Usona kultura Centro, okazinta 9 okt. 14 okt volontuloj, nekonataj al mi kaj inter si, renkontiĝis en moskva kafejo, distribuis la “tekojn”, kaj 30 okt ili okazigis la festivalon. Rave kaj brave! Por mi, la apero de tiu ĉi nova kolektivo de kreamaj gejunuloj, estas la plej grava atingo de la 1a MLFL.

Irina Gonĉarova

Московский молодежный эсперанто-клуб ЕК МАСИ
Московский фестиваль языков
Педагогический колледж №5

Московский ШКОЛЬНЫЙ ФЕСТИВАЛЬ ЯЗЫКОВ

В программе: 35 уроков языков разных народов, лекции, концерт, викторина

30 октября
воскресенье
11-00

Педагогический колледж №5
Москва, Столпный переулок, 16
"Улица 1905 года"

Вход свободный
для школьников и учащихся колледжа

www.lingvafestivalo.info/moskvo/ +7(905) 796-61-99 www.moskvo.ru



La Esperanto-stando en Bratislavo (Fotis Peter Baláž)

Biblioteko kaj pedagogio 2011

La 19an fojon okazis en Bratislava (Slovakio) la plej granda slovakia librofoiro *Biblioteko*, kunigita kun la ekspozicio *Pedagogio*.

En la foiro prezentiĝis apud diversaj librovendejoj, edukaj institucioj kaj didaktikaj helpiloj ankaŭ Edukado@Interreto. Dum kvar tagoj (3–6 nov) deĵoris ĉe la stando esperantistoj, kiuj informis pri lingvaj projektoj de E@I — paĝaroj por senpage lerni lingvojn: lernu.net por Esperanto, espa2.eu por la hispana, slovake.eu por la slovakaj kaj la nova projekto por la germana.

La vizitintoj povis ankaŭ informiĝi pri la ideo de Esperanto kaj pri funkciado de ĝia movado en Slovakio kaj eksterlande, kaj aĉeti lernomaterialojn aŭ literaturon en la lingvo.

Multaj vizitantoj de la foiro aliĝis al konkurso pri valoraj premioj de E@I kaj de la eldonejo *Espero*. La tasko — provi respondi sep demandojn pri lingvoj de la mondo (Lingva kvizo) — ŝajnis al plejparto de homoj sufiĉe malfacila, tamen ne estis kialo por bedaŭri: en lotumadon eniris ĉiuj respondoj, eĉ kun eraro. Tiuj, kiuj senerare respondis la tutan kvizon, akiris aldone la plej novan eldonon de DVD *Esperanto Elektronike*.

Kompare kun la antaŭaj jaroj, dum kiuj ni starigis Esperanto-budon en *Biblioteko*, ĉi-jare ni prezentis ne nur Esperanton, sed la spektro plilarĝiĝis je projektoj pri aliaj lingvoj.

La vizitantoj evidente pli serioze interesiĝis pri Esperanto, vidante ĝin apud la aliaj prezentataj lingvoj, ĉefe kiam ili eksciis, ke la laborlingvo en E@I kaj ankaŭ de plejparto de la utilaj projektoj estas Esperanto. Oni do vidis,

ke ĝi povas vere bone servi kiel ponto-lingvo en internacia komunikado, kaj ke la rezulto estas bonkvalitaj, utilaj, vere multlingvaj retejoj.

Katka Nosková

Expolingua en Berlino 2011

La lastan oktobran semajnfino E@I prezentis siajn lingvajn projektojn en la granda lingva foiro *Expolingua* en Berlino — vizitis ĝin entute pli ol 13 mil homoj.

En la ekspozicio prezentiĝis per multaj standoj diversaj organizoj kaj firmaoj, kiuj okupiĝas pri lingvo-instruado, eldonado de lernolibroj, interŝanĝoj k. s. Entute ĉeestis la aranĝon 132 prezentantoj el 26 landoj. Dum la foiro okazis kelkaj koncertoj kaj prelegoj pri diversaj lingvaj temoj. Ankaŭ Germana Esperanto-Asocio okazigis prelegon pri Esperanto.

E@I en sia stando prezentis siajn lingvajn retejojn — por lerni Esperanton kaj la slovakajn lingvon. Aldone ni prezentis la projekton “espa2.eu” — retejo por lerni komercan hispanan lingvon, kie E@I estas partnero, respondeca pri tradukoj al la slovakaj kaj la ĉeĥaj lingvoj. Ĉe nia stando ni organizis kvizon pri lingvoj.

Aparte ekzistis ankaŭ la Esperanto-budo, kiun prizorgis germanaj esperantistoj, do Esperanto estis bone videbla eĉ en du standoj dum la ekspozicio.

Krom prezenti siajn retajn projektojn (ĉefe Esperanton) la foiro estis por E@I bona okazo starigi novajn kontaktojn kun diversaj organizoj, eldonejoj, unuopuloj, kiuj estonte povas iĝi kunlaborantoj en niaj projektoj.

Peter Baláž

Unufraze

- ★ Tripersona delegacio de UEA (Renée Triolle, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo) partoprenis la 36an sesion de la Ĝenerala Konferenco de Unesko 25 okt – 10 nov en Parizo. (GK UEA)
- ★ Irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton malfermos la 9an EEU-Kongreson, kiu okazos 16-20 jul 2012 en Irlando. (*Eŭropa Bulteno*)
- ★ Armenia E-ista Unuiĝo (AEU) instalis standon antaŭ la domo de la Armena Societo de Kultura Kunlaboro kun Fremdaj Landoj. (AEU)
- ★ E-societo *Sreten Adžić* el Jagodina (Serbio) ricevis la urban medalon *Okto-barska plaketa* “pro 60 jaroj de ekzisto kaj laboro, pro kunordigo kaj edukado de junaj membroj...” (Dimitrije Janičić)
- ★ 21 sep la E-grupo de Angers (Francio) partoprenis la Internacian Tagon por Paco per porinfanaj E-ludoj, stando pri Hiroshima k bonvenigo en Eo. (Laurent Vignaud)
- ★ La premio Giorgio Canuto de la Universitato de Parma 28 okt estis aljuĝita al Sabrina Chetta el la Universitato de Milano pro la magistriĝa verko *Help-lingvoj kaj naturecaj teorioj*. (Luigia Oberrauch Madella)
- ★ 14 okt hispanaj e-istoj partoprenis en la Madrida manifestacio kadre de la tutmonda agado por reala demokratio. (*Eŭropa Bulteno*)
- ★ 18 okt en la biblioteko de la Komercia k Turisma Teknologia Lernejo de Changsha komenciĝis E-kurso por 240 lernantoj dividitaj en kvar klasoj; E-asocio de Changsha donacis al la lernejo 1800 E-librojn. (ĈIIC)
- ★ Du e-istoj partoprenis fine de oktobro la muzikan festivalon “Periferias” en Huesca (aŭ Osko, Hispanio): Roger Borges k Martin Wiese. (Landa Agado)
- ★ La premion Fabelo Internacia de la Instituto Pääatalo en Taivalkoski (Finnlando) ĉi-jare ricevis la Kuba grupo *Amiketoj de Kolibrido* pro sia fabelo *La rapida Ĉevalido*. (Aini Vääräniemi)
- ★ En la Dominika Respubliko fondiĝis Asocio Dominika de Eo (ADE) k Junularo E-ista de Domingo (JED), kiuj helpe de alilandaj e-istoj pretigas senpagan E-kurson en la kulturcentro de Santiago de los Caballeros “Ateneo Amantes de la Luz”. (Landa Agado)
- ★ 29-30 okt en Hangzhou okazis la 5a Jarkunveno de Ĉinaj E-Komercistoj kun la ĉeftemo “Starigi merkaton postulatan de Eo kaj helpi E-lernantojn trovi laboron”. (ĈIIC)

IKU invitas prelegontojn



Dum la 97a UK en Hanojo okazos la 65a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel ✉ PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; ✉ amri@huji.ac.il, ĝis 31 jan 2012.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝitaj de la IKU-komisiono kaj sekve la Estraro de UEA decidis, kiuj estos akceptitaj. La proponintoj estos informitaj pri la decido plej laste 30 apr 2012.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per honorario de 250 eŭroj.

GK UEA

Somera kongreso en januaro

Interesa tendenco en nia movado estas la multenombra partopreno de eksterlandanoj dum niaj naciaj kongresoj de Esperanto. Ekzemplo pri tio estas la lasta itala kongreso, kiu en aŭgusto pasinta kunvenigis en Torino esperantistojn el 30 landoj dum iaspeca mini-Universala Kongreso!

La frosta vintro en la norda hemisfero ne tro favoras niajn renkontiĝojn, sed en la somera tropiko ili allogas vizitantojn ĉefe el la norda hemisfero. Pro tio la brazilaj esperantistoj varme invitas al sia 47a Nacia Kongreso, kiu okazos 15–19 jan 2012 en la urbo Taguatinga / Brasilia (DF).

La ĉefurbo Brasilia jam gastigis du naciajn kaj unu universalan kongresojn kaj nun oni donis la organizan taskon al la satelita urbo Taguatinga, kie la loka Esperanto-movado estas aparte vigla.

Tiu elekto jam kreis amuzan miskomprenon, kiam eksterlanda kandidato al partopreno vane serĉis flugon al Taguatinga (je 20 km de Brasilia)! Evidente li ne trovis flugon, sed li spertos someran klimaton en la plej moderna ĉefurbo de la mondo, kie antaŭ 60 jaroj ekzistis senhoma savano loĝata nur de dazipoj, emuoj kaj jaguaroj!

La Organiza Komitato garantiis la ĉeeston de du elstaraj aktoroj Georgo Handzlik kaj Saša Pilipoviĉ, kiuj donos brilon al nia arta programo.

Brasilia estas facile atingebla rekte el Lisbono per ĉiutagaj flugoj de kompanio TAP kiuj, en nur 8 horoj, atingos la ĉefurbon de Brazilo.

Por eksterlandanoj la aliĝo estas senpaga kaj la hoteloj ne kostaj.

Simple aliĝu rete ĉe taguatek.org.br kaj ricevu ĉiujn necesajn informojn.

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia

Skota-Brita Kunkongreso



Oni povos sperti kvin tagojn da Esperanto kaj da ĝuo en Edinburgo, la bela ĉefurbo de Skotlando, kie kunmetos en 2012 siajn proprajn kongresojn en unu Kunkongreson la E-Asocioj de Britio kaj Skotlando.

Edinburgo estas monde fama pro sia antikva kastelo staranta alte super la centro de la urbo, la mezepoka “Royal Mile” (reĝa mejlo), kaj la eleganta “New Town” (nova urbo) apud kiu situas nia kongresejo. Konsiderinda parto de la tumulta historio de Skotlando okazis en Edinburgo kaj videblas multaj restaĵoj de tiu historio.

De vendredo (20 apr) ĝis dimanĉo (22 apr) oni partoprenos buntan programon, inkluzive de vizitoj al la moderna Skota Parlamento kaj al la Palaco de Holyrood, la oficiala domo de la Brita Reĝino en Skotlando. Nia ĉefpreleganto estos István Ertl. Okazos ankaŭ distraj eroj kaj bankedo.

En la Postkongreso (23–24 apr) oni ekskursos al la mistera “Rosslyn Chapel” (kapelo de Rosslyn) jam fama antaŭ la filmo “The Da Vinci Code”; al la inĝeniera mirindaĵo “Falkirk Wheel” (rado de Falkirk), unika en la mondo levilo de kanalboatoj; al la artgalerioj (aŭ butikumejoj) de Glasgovo; finfine, kaj plej grave, al distilejo de altkvalita viskio proksima al Loch Lomond.

Prezroj kaj pliaj detaloj baldaŭ sekvos.

Ĉu Eŭropo havas patentitajn tomatojn kaj bovojn?

de Dafydd ab Iago

En novembro la Eŭropa Patenta Oficejo (EPO) aŭdis alvokojn de internacia firmao Unilever kaj retiris patenton, antaŭe donitan al israela petanto por tomato. Tamen EPO ne akceptis definitivon, sed plusendis la kazon al apel-instanco.

La revokita patento EP 1211926 protektus semojn kaj tomatojn derivitajn tra tradicia kultivado. Esence, la israela eltrovanto kombinis tomatojn de sia regiono kun plej komunaj varioj. Rezulte, la tomatoj nun havas reduktitan akvoenhavon. Pro tio ili interesas grandajn manĝaĵfirmaojn, specife por fari manĝaĵojn jam pretajn, ekzemple, keĉupon. La patento estis retirita sekve al plendo de la internacia firmao Unilever por protekti siajn proprajn komercajn interesojn.

En la lasta jaro EPO ne donis patentojn al petantoj por protekti tradiciajn agrokulturajn metodojn. Tamen produktaĵoj ricevitaj per tiaj metodoj restas patenteblaj. La nuna decido pri la israelaj tomatoj reprezentas historian etapon. Se la lasta apel-instanco de EPO konsentos, ne plu eblos patenti agrokulturajn produktaĵojn normale kultivitajn.

Post la disdonado de pli ol cent tiaj patentoj, EPO jam alfrontas plurajn tiklajn kazojn, ekzemple pri patentado por brokolo fare de la brita firmao Plant Biosciences, porkoj de la usona firmao Newsham Choice Genetics, kaj bovoj de grupo de novzelandaj kaj belgaj entreprenistoj kaj sunfloroj fare de la hispana ŝtato.



“Institucio kiu deklaras kiel industriajn «inventajojn» tomatojn, brokolojn kaj melonojn, subfosas sian propran legitimecon”, — diris Christoph Then el la neregistara organizaĵo Greenpeace. Laŭ Then, ĉi tiu unua decido de EPO estas grava sukceso por ĉiuj, kiuj malakceptas la patentojn por plantoj kaj animaloj. “Tamen homoj ne povas fidi je EPO”, — atentigis Then. Li alvokas al nova konvencio reganta EPOn, kiu donos demokratian kontrolon fare de Eŭropaj registaroj. Laŭ Then, EPO faras decidojn favore al la bioteĥnologia industrio.

La argumento de Greenpeace kaj aliaj estas, ke konsumantoj, kultivistoj kaj produktistoj de nutraĵoj en evolulandoj kaj en Eŭropo estos eĉ pli dependaj je grandaj internaciaj nutraĵfirmaoj.

Deklaro pri Homaranismo 2011

La dua Simpozio pri Homaranismo, organizita de Kultura Centro Esperantista (KCE) kun la apogo de Scienca Instituto Zamenhof (SIZ) kaj de Hilel-ista Esperanto-Komunumo (HEK), komisiis al tri prelegintoj la preparon de konkluda deklaro. La tekston redaktis ĉefe sen. Bertil Nilsson, kiu submetis ĝin al la diskutlisto de SIZ, la plej aktiva vojnodo por zamenhofologoj.

La debato kondukis al la konkludo, ke estu publikigita deklaro kiu ne estu atribuita anonime al la tuta kunveno (laŭ bedaŭrinda tradicio, kiun rompis unuafoje la Manifesto de Raŭmo), sed havu individuajn subskribojn. Krome, la deklaro estu la fundamento por invito al kongreso en Ĉaŭdefono, 2014. Jen la teksto kun la unuaj subskriboj:

Deklaro pri Homaranismo 2011

a) Homaranismo celas nuligi aŭ mildigi etnajn kaj religiajn konfliktojn en la mondo kaj konstrui pacan kunvivadon de popoloj.

b) Homaranismo ne estas religio, kvankam ĝi devenas el la hebrea monoteismo, por kiu komence Zamenhof pensis krei apartan sekton (sub la nomo Hilelismo).

c) Homaranismo ne estas ideologio, sed proponas metodon, kiel krei interetan kulturon, kiu povas eviti interpopolajn konfliktojn.

d) Do, homaranismo celas ne nur respekti homojn kiel individuojn, sed ankaŭ homojn kiel partumantojn de apartaj kulturoj.

e) Ĝis nun tiu problemo estas nek teorie, nek praktike solvita, malgraŭ diversaj streboj tiudirekte.

Unuaj subskribintoj:

Bertil Nilsson, Walter Ŵelazny, Giorgio Silfer, Perla Martinelli, Raymond Brisebois, Armando Zecchin, Anna Bartek (Anjo Amika).

Gloso de sen. Bertil Nilsson:

Ni memoru, ke LLZ estis kuracisto. Li konstatis, ke la homaro suferas. Li faris anamnezon, diagnozon, prognozon. Li konstatis, ke la dus-funkcio konsistas en la sinidentigo. En sia bezono identigi sin kun io pli granda ol si mem, la homoj identigas sin kun malsamaj grupoj. Tio kaŭzas la malsanon. Li decidis, ke sinidentigo kun unu sama grupo, la homaro, estus vojo al sano. Li preskribis certan vivreĝimon por atingi tion. Lia metodo por akceptigi sanigan vivreĝimon estis unue injekti ĝin en malgrandan grupon, kiu poste kontaĝos

ĝin al la tuta homaro. Por ne vekti kontraŭstaron la motivigo por ŝanĝita vivreĝimo devis esti tre vasta. Se sekve de tio ĝi ankaŭ enhavus placebajn elementojn, tute ne estis grava. Kiel sperta kuracisto li kompreneble ne anoncis, ke tio estas placebo, tio ĉi ne. Tial estas vane spekuladi pri ia homaranismo, kiu ekzistus kiel ia filozofia vivkoncepto de LLZ mem. Se ni konsultas kuraciston, ni ja ne atendas, ke li prezentu sian propran kredon aŭ filozofion, sed ke li faru lertan diagnozon kaj donu efikan preskribon.

Krome, la saniĝo povas havi stadiojn kaj ili povas varii inter personoj. Evidente LLZ kredis, ke kelkaj personoj tuj povas plene identigi sin kun la homaro. Sed en la unuaj generacioj aplikantaj la novan vivreĝimon li konsideris duoblan identecon* pli realisma celo.

La psikologo William James verŝajne tre bone komprenis Zamenhof. Ne estas hazardo, ke Edmond Privat estis invitita prelegi al liaj studentoj.

* **Duobla identeco:** Se mi elmigras al Francio, lernus la francan, adaptiĝus al la franca socio aŭ eĉ karierus en ĝi, parto de mia identeco certe restus sveda ĝis mia morto, sed alia parto fariĝus franca. Nu, la metodo de LLZ kaj ni [en la Esperanta Civito] estas aldoni al niaj jamaj identecoj unu identecon saman (esperantian-homaranan) por ĉiuj, eĉ sen elmigro.

Esperanto en Vikipedio



Esperantistoj ofte tro reklamas Esperanton al si mem kaj neglektas informadon de tiuj, kiuj ĝin ankoraŭ ne parolas. Tiun konkludon mi lastatempe faras ĉiam pli ofte, kaj ankaŭ mia esploro pri la kvalito de prezentiĝo de Esperanto en la nacilingvaj versioj de la interreta enciklopedio

Wikipedio konfirmis tiun fenomenon.

En aŭgusto mi esploris la artikolojn *Esperanto* en dek plej grandaj lingvoversioj de la Vikipedio — la angla, hispana, rusa, germana, japana, franca, portugala, pola, itala, nederlanda — kaj aldone en la ĉeĥa, la dana (pro la kopenhaga UK) kaj Esperanto mem. Por ĉiu artikolo mi faris kvantan pritakson de ĝia kvalito, pere de diversaj indikiloj: kiomfoje ĝi estis redaktita, kiom da bildoj troviĝas en ĝi, kiom da referencoj al fontoj enestas, kiom da signoj la teksto ampleksas, kiom da redaktantoj priatentas ĝin, ĉu ekzistas voĉlegita versio de la artikolo. Ankaŭ interesis min, ĉu la artikolo efektive parolas pri la nuntempo de Esperanto.

La rezulto indikas, ke multe da laboro estas ankoraŭ fendanda. La plej vizitata artikolo angla kun 68 mil legantoj monate eble estas ankaŭ la plej redaktita (3976 redaktoj), sed mankas en ĝi informoj pri EAB aŭ Esperanto-USA kaj ekzisto de Esperanto-junularaj organizoj estas tute prisilentata. La lasta UK eksplicite menciita estas tiu de 1905, la IJK tiu de Raŭmo (pro la manifesto). Krom la verda stelo kaj jubilea simbolo enestas nur kovriloj de la unua libro kaj de *Monato*, kaj slipeto el la islanda penismuzeo.

Alia artikolo kun multa atento, la pola, enhavas nur du bildojn, kvin fontindikojn, mankas PEA kaj ĝi mencias neniun eventon el la jaroj 2009–2011. La dana artikolo ja mencias la UK-n, sed la leganto ne ekscias ke en 2011 ĝi okazis en Kopenhago! Ene de la esploritaj vikipedioj, Esperanto estas plej atentata en la ĉeĥa, kie ĝi estas la 1406a plej legata el ĉiuj 200 mil artikoloj, kaj en la rusa (1635a el 750 mil). Tion tamen facile superas la esperantistoj, kiuj vizitas sian esperantlingvan artikolon pri Esperanto kiel la 5an plej oftan!

Estas tamen ankaŭ laŭdindaj esceptoj, kiel la itala artikolo: kun multaj fontoj, pluraj bildoj kaj premiita de la itala vikipediista komunumo, kvankam ja kun mencio de Ĝangalo kaj neniun rememoro de la florenca UK (2006). Elstara, ankaŭ laŭ decido de la neesperantista vikipediista komunumo, estas la artikolo ĉeĥa: pri ties evoluo, kompletigo kaj konformigo al ĉiuj normoj laboregis en 2007 du esperantistoj-vikipediistoj (Petrus Adamus kaj mi — Blahma), subtenataj de la loka komunumo kaj de UEA kiu afable donis permeson pri reuzo de “Ĝisdate pri Esperanto” por ŝtopi la breĉon en la rakonto pri historio kiu antaŭe haltis ĉe la dua mondmilito.

La vikipediajn artikolojn ofte uzas ankaŭ ĵurnalistoj, kion povas atesti nia ĉeĥa sperto — jam plurfoje oni aŭdis en radiaj kaj televidaj raportoj pri Esperanto frazojn aŭ listojn (ekzemple, de famaj esperantistoj) precize kopiitajn el la Vikipedio. Ja Vikipedio ne estas ilo de propagando, kaj neŭtraleco en informado necesas; aliflanke, se ne ni esperantistoj verkas tie pri Esperanto en nia nacia lingvo, kiu alia havas la scion por tion fari? Dum la Esperanta Vikimano en Svitavy kreiĝis grupeto kiu intencas lanĉi kampanjon por multlingvigi la ĉeĥan artikolon pere de Esperanto.

Marek Blahuš



Konkluda diskuto en la unua Esperanto-Vikimano 2011 en Svitavy (Fotis Marek Blahuš)

La unua Esperanto-Vikimano

26–30 okt okazis en la ĉeĥa urbo Svitavy seminario pri Vikipedio omaĝe al la dekjara jubileo de ĝia Esperanto-versio. La ĉeforganizanto de la unua internacia renkontiĝo de esperantistoj-vikipediistoj estis Pavla Dvořáková (ĈEA) kun kontribuo de E@I.

Venis pli ol 30 komencantaj kaj spertaj vikipediistoj el ok landoj. La trejnadon gvidis, interalie, Chuck Smith, la fondinto de la Esperanta versio de Vikipedio, kaj Miroslav Malovec, kiu — instigita de Chuck Smith — fondis la ĉeĥan version.

Ĉar en Svitavy ekde 2008 havas sian sidejon Esperanto-Muzeo, oni utiligis la restadon por viziti ĝin. En ĝi okazis parto de la programo, malfermita por publiko — solena prelega matineo omaĝe al dekjarigo de la Esperanta Vikipedio.

El la rezultoj de Vikimano menciindas precipe plibonigo de diverslingvaj versioj de 17 vikipediaj artikoloj (i.a. pri Svitavy, Pardubice, Oskar Schindler kaj Valentin Oswald Ottendorfer) kaj pliriĉigo de Vikipedia Komunejo je 11 foto-grafaĵoj. Multaj artikoloj estis kompletigitaj laŭ siaj sperte ellaboritaj Esperanto-versioj, kio montras praktikan valoron de la pontolingvo ankaŭ al publiko.

Katka Nosková

Mankas morala kuraĝo

Responde al sia propra demando: “Kial nia propagando malsukcesas?” Trevor Steele ĝuste asertas [jene](#): “Ŝajnas vere, ke la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por adopti Esperanton. La decidoj pri tiaj aferoj estas ankoraŭ en la manoj de la potenculoj de la mondo, kaj ili ja profitas de la prestiĝo de siaj lingvoj” (LOdE, №11, p. 15).

Alivorte, kvankam la nunaj arbitraciantoj en homaj aferoj disponas pri abundegaj riĉaĵoj, morala kuraĝo mankas al ili (same al multaj el ni), ĉar laŭ ili financa profito pelas preskaŭ ĉion.

Alivorte, la kancero de materialismo (laŭ ambaŭ difinoj!) estas la nuntempa malbeno afliktanta ĉiujn altruismajn movadojn. Do, kerna demando kaj analizo restas por onta artikolo. Kial ĝuste nun, pli ol iam ajn en la pasinteco, la dolaro forkonsumas nin, aparte la junan generacion? Estas precipe en la glorigo de la strebo al materiaj riĉaĵoj kie la tereno devas esti ebenigita por la konstruado de nova mondo taŭga por niaj posteuloj. Kiel atingi tion, kara Trevor?

Paul Desailly

Germanio: Nova ŝanco por Esperanto

Laŭ la decido de la Germana Konstitucia Tribunalo, akceptita la 9an de novembro, malgrandaj partioj povos pli facile ekhavi deputiton en la Eŭropa Parlamento. La tribunalo decidis, ke la ĝisnuna 5-procenta sojlo estas kontraŭkonstitucia, tiel ke ekde la Eŭropaj Balotoj en 2014 en Germanio jam ĉ. 1% de la voĉoj sufiĉos por ekhavi deputiton.

Pri tiu ĉi decido ĝojas precipe la germana Partio Unu Mondo (Eine-Welt-Partei), kiu laŭ sia statuto kaj sia baza programo decide subtenas ankaŭ Esperanton. Ĝi estas unu el la 112 germanaj partioj registritaj ĉe la germana balotestrejo. Ĉar tri kvaronoj de ĝiaj membroj estas aktivaj esperantistoj, ĝi supozeble havos esperantistajn kandidatojn sur la unuaj lokoj de sia listo por la Eŭropaj Balotoj en 2014. Tamen la partio trovas ankaŭ sufiĉe da simpatio kaj parte eĉ fortan subtenon de neesperantistoj, tiel ke ĝi — kontraŭe al EDE, kies programo allogis en Germanio preskaŭ nur esperantistojn — principe povus iam esti simile sukcesa en balotoj kiel aliaj etaj partioj, ekzemple la bestoprotekta partio aŭ la familia partio, kiuj ofte gajnas ĉ. 1% de la voĉoj en balotoj.

Unu Mondo estiĝis el la interna ideo de Esperanto kaj celas al justa tutmondiĝo, aktivante i.a. por pli fortaj demokratiaj strukturoj sur tutmonda nivelo kaj por malpliigo de la abismo inter riĉaj kaj malriĉaj landoj.

Ulrich Matthias

Pri Okcitanaj kantoj

En la 8–9-a numero de *La Ondo de Esperanto* en la rubriko *Ricevitaj libroj* aperis informo pri la aperinta libro *Okcitanaj kantoj en Esperanto*.

En la informo estas kelkaj misaj momentoj:

Unue, laŭvortajn tradukojn el la okcitana kaj la franca lingvoj faris ne mi (mi bedaŭrinde ne posedas tiujn ĉi belajn lingvojn), sed miaj helpantoj: André Andrieu, Svetlana Smetanina, Tatjana Loskutova kaj Maria Novikova. Mi nur poezie adaptis la tradukaĵojn.

Due, la disko de okcitanaj kantoj en Esperanto estas nur planata (estis interkonsento kun *Vinilkosmo* pri la eldono, kiun Flo Martorell antaŭnelonge denove certigis malgraŭ la septembra incendio en la studio). Do, estas espero, ke la projekto efektiviĝos.

Ludmila Novikova

La 14an de septembro 2011 en urbo San-Paŭlo forpasis

Helmuth Schenk (1924-2011)

emerita fiska kontrolisto, esperantisto ekde 1947, fondinto kaj la unua prezidanto de la Societo Esperantista en Pelotas, en la brazila subŝtato Suda Riogrando.

La 9an de oktobro 2011 en Beogrado forpasis

Gvozden Sredić (1935-2011)

ekonomiisto, vicprezidanto de Jugoslavia Unuiĝo de transportaj tarifistoj, vortaristo, tradukanto. Esperantisto ekde 1952, li gvidis kursojn, estis prezidanto de Jugoslavia E-Ligo, de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, honora membro de IFEF; verkis lernolibron *Esperanto por fervojistoj* (ses eldonoj), kaj plurajn fakajn librojn kaj artikolojn, redaktis *Jugoslavian Fervojiston*.

Ni funebras kaj kondolencas.

Esperanto jam estas sukceso



En la prezento de la postkongresa [artikolo](#) *Ĉu malesperi?* de Trevor Steele, la jena frazo de li estis elstarigita: “Esperanto ŝajnas senperspektiva hobbio de manpleno da homoj, kiuj pensas eble idealisme, sed ne realisme” (LOdE, 2011, №11, p. 15).

Permesu min ŝanĝi unu vorton:

Finvenkismo ŝajnas senperspektiva hobbio de manpleno da homoj, kiuj pensas eble idealisme, sed ne realisme.

Ne estas nur du elekteblaj sintenoj: finvenkismo aŭ raŭmismo. Mi rimarkis la teniĝon al tiuj du en la artikolo de Steele.

Esperanto ne devas esti tutmonda lingvo por esti sukcesa. Esperanto ne estu traktata kiel minoritata lingvo de iu diaspora etno!

Esperanto estas lingvo en kiu tradukistoj rajtas ŝanĝi la vortordon por pli proksimiĝi al la strukturo de la fontlingvo. Tradukistoj rajtas konstrui vorton kiu proksimiĝas al vorto en la fontlingvo.

Esperanto estas lingvo kiun rakontistoj ĝuas muldi laŭplaĉe kaj laŭbezone, por prezenti pli artajn verkojn.

Esperanto estas lingvo kiun pacamantoj brakumas kaj uzas kiel simbolon de paca kaj egal(ig)a interkomunikado.

Esperanto jam estas sukceso por tiuj uzantoj. Inter ili, mi. Ni ne atendas venkon; eble ni eĉ ne volas venki la mondon. Kaj ni estas tro inkluzivemaj por konsideri la ideon de raŭmismo. La plivastismo preparolata de José Antonio Vergara (vd. p. 3) estas multe pli prudenta sinteno ol finvenkismo, kiu suferas rigidajn doktrinecon kaj propagandon. Plivastismo, la emo kunhavigi oportunaĵojn aŭ utilaĵojn kun najbaroj, venos nature en niaj interagoj kun aliaj.

Sed, finvenkistoj, vidu la kontraston de Linukso kun Vindozo. Linukso estas libera, malfermita sistemo por funkciigi vian komputilon, kreita de tutmonda komunumo. Vindozo estas multekosta sistemo kiun vi ne vere posedas aŭ rajtas regi post via “aĉeto”. Tamen, Vindozo estis kaj estas pakita kune kun la PC-komputilo, do preskaŭ ĉiu en la mondo uzas Vindozon. Linukso do, ne havis ŝancon sukcesi kontraŭ Vindozo. Sed nun, malgraŭ ke la pliparto de uzantoj devas lerni pri la ekzisto, devas elŝuti kaj instalii Linukson, malgraŭ tio, uzo de Linukso komencas sori. La plivastiĝo de bona ideo okazas, malgraŭ monopolo. Ne malesperu. Nur ne rampu en izolatan splenon de la raŭmista kokono, post via raŭpa elreviĝo pri forkonsumanta triumfo.

Raŭmistoj — nu, mi ne volas paroli al minoritato kiu ne ekzistas.

Sed jes, *realistoj* ekzistas en Esperantujo, Trevor. Plej verŝajne, ni ne kongresumas.

Cindy McKee

RADIO		Radio Esperanto
ESPERANTO		<i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i> Podkasta servo de <i>La Ondo</i> Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru

Warunki prenumeraty:
w Warszawie: rocznie Rb. 4, półrocznie Rb. 2, kwartalnie Rb. 1. W Królestwie i Cesarstwie: rocznie Rb. 5, półrocznie Rb. 2.50, kwartalnie Rb. 1.25. Zagranicą rocznie Rb. 6. Za odnośnienie do domu dopl. się miesięcznie k. 5. Zmiana adresu 20 kop.

KOSMETYKA

Cena ogłoszeń:

Za wiersz petitowy jedno-szpaltowy lub jego miejsce: Na 1 stronie okładki 30 kop. Na innych stronach 20 kop. Nadesłane (w tekście) 75 kop.

Numery pojedynczy kosztują 10 k.

Tygodnik poświęcony racjonalnej kosmetyce, estetyce ciała i perfumerji.
Wychodzi w każdą Sobotę.

Adres Redakcji i Administracji **Senatorska 36.**
Administracja otwarta codziennie od 11—3 prócz niedziel i świąt.

Redaktor przyjmuje tylko w Niedziele od 12—2.
Rękopisów i listów nadsyłanych do Redakcji nie zwraca się.

Forgesita gazeto de Henriko Zamenhof

Kvankam esperantistoj interesiĝas pri la familanoj de Lazarj Markoviĉ Zamenhof ĉefe rilate ilian rolon en la Esperanto-movado, oni scias, ke ĉiuj fratoj de Doktoro Esperanto estis kuracistoj.

Ankaŭ Grigorij (pole: Grzegorz, Esperante: Henriko), naskiĝinta la 24an de septembro 1871 en Bjalistoko, ne estis escepto. Li specialiĝis pri haŭtmalsanoj kaj higieno. Li ne nur kuracis, sed ankaŭ verkis, redaktis kaj eldonis.

Zofia Banet-Fornalowa en *La familio Zamenhof* sciigas, ke li en 1912–1914 kaj en 1924 eldonis la gazeton *Kobieta* (Virino). Sed ŝi ne mencias, ke *Kobieta* estis alititola daŭrigo de pli longhistoria gazeto, kies lasta kajero aperis ĝuste antaŭ cent jaroj — en decembro 1911.

En la 4a volumo de *Bibliografio de Ruslandaj periodaĵoj, 1901-1916* (Leningrad, 1961) oni facile trovas la nomon “Zamenhof, Georg. Markus. 4106”; kaj sub la numero 4106 en la 2a volumo de la *Bibliografio* (Leningrad, 1959) estas iom neplenaj indikoj pri la revuo *Kosmetyka* (Kosmetiko), kiun en Varsovio eldonis d-ro G. M. Zamenhof.

La gazeta fako de la Ruslanda Ŝtata Biblioteko en la apudmoskva urbo Ĥimki havas kompletan de *Kosmetiko*, kiun mi plezure foliumis (ankaŭ por perfektigi mian polan lingvon).

La unua kajero de la ĉiusemajna *Kosmetyka* aperis la 6an de novembro 1906 (ankaŭ mi naskiĝis la 6an de novembro!). Ĝin redaktis kaj eldonis en Varsovio dr. H. Zamenhof — tiun subskribon, sen deĉifrado de la antaŭnomo, oni trovas ankaŭ sub liaj artikoloj kaj en reklamoj de lia kuracista kabineto.

GABINET LEKARSKO-KOSMETYCZNY

D-ra H. Zamenhovia

SENATORSKA Nr 36. TEL. Nr 40-29.

Leczenie chorób skóry i włosów i kosmetyka lekarska (cera, włosy i wady urody). Mechanoterapia kosmetyczna. Masaż plastyczny, wibracyjny, pneumatyczny i elektryczny. Vaporizacja. Termo-foto i elektroterapia. Elektroliza. Katarforeza.

La revueto havis la subtitolon “Ĉiusemajna periodaĵo dediĉita al racia kosmetiko, estetiko de la korpo kaj parfumoj. Aperas ĉiusemajne”. En Varsovio la jarabono kostis 4 rublojn, en la [Pola] Reĝlando kaj en la [Ruslanda] Imperio — 5 rub, eksterlande — 6 rub. La unuajn kvar kajerojn presis W. Cywiński en Nowy Świat №36 kaj poste J. Kamiński en Nowy Świat №48. La redakcia adreso estis tiu de la redaktoro (Senatorska №36) kun la averto, ke la redaktoro akceptas dimanĉe de la 12a ĝis la 14a.

Entreprenante la novan periodaĵon Henriko Zamenhof estis certa, ke ĝi esprimas gravajn bezonojn de la socio. Li skribas en la enkondukita artikolo:

“Kosmetiko en la lastaj jaroj progresis, kaj danke al dermatologoj, higienistoj kaj kemiistoj, ĝi komencas turni sin al la vojo pli scienca, kaj hodiaŭ ĝi kiel aparta branĉo de saniga scienco, akiris plenrajton en medicino. Samtempe alilande, precipe en Francio, la kosmetika arto venis al alta nivelo de la evoluo kaj iĝas unu el la gravegaj industriaj branĉoj. Sed produktado ne ĉiam troviĝas en la kompetentaj kaj honestaj manoj, kaj la problemoj de kosmetikaĵoj, vide al ilia disvastigo, povas esti grava por la publika sano, tial tasko de nia periodaĵo estos ankaŭ: 1. konatigi la vastan publikon kun diversaj specoj de kosmetikaĵoj, 2. vidigi iliajn malutilojn, 3. garantiado de ilia uzado, 4. fine, klerigado pri estetika sento tra disvastigo en la vastaj rondoj de la socio de principoj de racia kosmetiko kaj belig-arto (estetiko de la korpo), sin apogantaj je la bazoj de anatomio, fiziologio, kemio kaj higieno”.

En novembro-decembro 1906 aperis ok kajeroj. En 1907 enmondigis 51 kajeroj, kaj dum 1908–1911 *Kosmetyka* estis ĉiusemajna. La subtitolo iĝis jena: “Ĉiusemajna periodaĵo dediĉita al higieno kaj estetiko de la korpo, flegado de beleco, racia kosmetiko kaj parfumoj”.

Dr. H. Zamenhof estis la plej aktiva aŭtoro en sia propra gazeto. Inter liaj

artikoloj kaj cikloj estis, interalie, la kvarparta artikolo *Flegado de haŭto, Flegado de vizaĝhaŭto, Kiel eviti lentulojn, Kosmetiko de la haŭto: Kiel kuraci sekecon kaj malglatecon, Ruĝeco de nazo, Kosmetika masaĝo kaj multaj aliaj, kies temoj estas regurdataj ankaŭ nun.*


En la gazeto estis bildoj, multaj reklamoj. Fojfoje aperis modesta reklamo de “Kabineto kurac-kosmetika de Dr. H. Zamenhof” en la stato Senatorska. Inter la reklamoj troviĝas tiu de la apoteko de F[eliks]o. Zamenhof en Varsovio, Żelazna Brama №8, kun la indiko “ni rekomendas en la proksimiĝanta tempo freŝan muruoleon el Lofod [Svedio]”.



Fine de 1911 la redaktoro resumis la kvinjaran eldonperiodon, dum kiu *Kosmetyka* okupis ekskluzivan lokon en la pola gazetaro kaj iĝis bezonataĵo de ĉiu inteligenta virino. La redaktoro kaj la aŭtoroj sukcesis krei tipon de periodaĵo, kiu kunigis formon distran kaj elegantan kun la temoj prezentitaj science.

Kvankam la gazeto ja plaĉis al la legantinoj, la tro malvasta titolo *Kosmetyka* ŝajnis obstaklo por allogi novajn abonantinojn. Tial ekde 1912 Henriko Zamenhof ŝanĝis la titolon de la periodaĵo al *Kobieta* kun la sama temaro. Sed pri ĝi Banet-Fornalowa jam rakontis.

Halina Gorecka



Fonto

La eldonejo *Fonto* naskiĝis en 1980 pro tio, ke Torben Kehlet — por kiu *Fonto* tiutempe kompostis plurajn verkojn (vidu poste) — ne konsentis, por festi la 400-jaran datrevenon de la morto de l' fama Portugala poeto Luís de Camões, eldoni ties verkon *La Luzidoj*. Li diris: “Se vi tiom ŝatas ĉi tiun verkon, do eldonu ĝin!” Gersi Alfredo Bays efektive intencis eldoni nur du librojn: *La Luzidoj* kaj la verkon de sia amiko Jorge Amado (*La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko*), tiam la plej fama brazila romanverkisto (por kiu li kunlaboris revizianta librojn). Sed tuj venis amaso da proponoj (pere de William Auld)... kaj ĝis nun li ankoraŭ ne haltis en eldonagado.

La revuo *Fonto* naskiĝis pro la sama kialo: Kehlet volis eldoni literaturan revuon kaj intencis revivigi *Nordan Prision*. Ĉar oni bezonis du monatojn por reagi... li perdis la entuziasmon pri literatura revuo, kaj diris: “Se vi volas eldoni revuon, do tion faru vi!”

Gersi Bays havis amaseton da “nomoj” por la revuo kaj eldonejo... kiujn li vortare serĉis... ĝis li atingis “Fonto”. Jen la nomo! Kelkajn jarojn poste, kompostante la verkon *Rikolto* li miregis pri tio, ke Juan Régulo Pérez “preskaŭ” elektis tiun nomon... Nun, kiu kredos tion?!

Li komence kompostis librojn por Torben Kehlet: *Esperantologiaj Studoj* de Eugen Wüster (lia unua kompostolaboro!), *Ĉiu ĉiun* de Teo Jung, verkoj de Johán Valano *Ĉu li bremsis sufiĉe* k.a. De la komenco grave konsilis William Auld pri la elekto, kion eldoni, poste la revuon redaktis kelkajn jarojn Daniel Luez, Gerrit Berveling depost 1993 transprenis la redaktadon. Sed la eldonadon mem fakte daŭre prizorgis Gersi Bays mem, kiel teknika redaktoro.

Same kiel TK/Stafeto kaj FEL, ankaŭ *Fonto* plukonstruis sur la heredaĵo de *Stafeto*: same kiel ĝi — baze nur la laboro de unu persono (Régulo Pérez en *Stafeto*, Gersi Alfredo Bays en *Fonto*); same kiel ĝi — nur libroj kun enhave bona kvalito; eĉ multe pli da titoloj ol *Stafeto*, entute pli ol 130 ĉe *Fonto*. Kaj ankoraŭ aperas novaj libroj, plej laste dulingva poemaro (latina kaj Esperanta) de Jozef Rumler.

Fonto klare spronis multajn talentulojn: sur ĝiaj paĝoj kaj en ĝiaj libroj pluraj gravaj aŭtoroj debutis. El la originala proza literaturo ni menciu



ekzemple: Trevor Steele *Sed nur fragmento*, Eli Urbanová *Hetajro dancas*, Gersi Alfredo Bays *La profeto el Pedras*, Gerrit Berveling *Ajnasemajne kaj Fadenoj de l' Amo*.

Specialan lokon meritas Juan Régulo Pérez — *Rikolto* (red. Reinhard Haupenthal kaj Gaston Waringhien) kun arego da eseoj. Kaj la krestomatia libro de Gerrit Berveling *Mia Pado: tekstoj el 25 jaroj*, same pluraj eseoj de Geraldo Mattos pri nia lingvo: pri la partcipa sistemo, ktp.

Ankaŭ aperis esearoj ligitaj al la Akademio de Esperanto: *Jubilea libro de Akademianoj — Centjara Esperanto* en 1987 (red. Geraldo Mattos) kaj *Lingva Planado kaj Leksikologio* (red. Christer Kiselman kaj Geraldo Mattos, Zagreb 2001); tute speciala temo estas la didaktika verko de Yamasaki Seikō *Enkonduko en la Japanan*. Ni ne forgesu la brilajn eseojn de William Auld en *Kulturo kaj Internacia Lingvo*.

Geraldo Mattos montris iom neatenditan flankon, kiam li aperigis ĉe *Fonto* eĉ instrulibrojn pri la Latina: *Iter Latinum* kaj *Latine Loquere*.

En la poezia tereno ni fieras pri *La infana raso* de William Auld (kun portugallingva paralela versa traduko de Leopold H. Knoedt); Josef Rumler *Lasta ĉevalo*; Eli Urbanová *Vino, virino kaj kanto*; Geraldo Mattos *La libro de Nejma*, *La libro de Adoro* kaj *Barbaraj sonoj kaj sonetoj*.

Traduke aperis amaso da verkoj el plej diversaj lingvoj: de Reinhard Haupenthal el la germana, de Geraldo Mattos el la portugala, de Kris Long el la rusa, de Leopold H. Knoedt kaj aliaj el la portugala, de Hilda Dresen el la

estona, de Ionel Oneț el la rumana, de Fernando de Diego el la hispana kaj angla, Tomáš Pumpr el la ĉeĥa, k.a. Aperis pluraj tradukoj de Gerrit Berveling: *Antologio Latina* (4a volumo presata, el la latina), *La Bona Mesaĝo de Jesuo* (la kvar evangelioj, el la greka), *La Duakanonaj Libro* el la greka (3a volumo ĉe VoKo), *Lukio aŭ azeno* el la greka, *La konspiro de Katilino* el la latina, *Du Virinoj* el la nederlanda. Enrico Dondi riĉigis nian literaturon per pluraj tradukoj el la itala: de Dante la trivolumenta *Dia Komedio*, *Vivo Nova*, *La Floro*, kaj *Jerusalemo Liberigita* de Torquato Tasso. William Auld venis kun *Omaĝoj* — poemtradukoj plejparte el la angla. Fernando de Diego tradukis el la hispana: de Gabriel García Márquez *Cent Jaroj da Soleco*, de Pablo Neruda *Dudek poemoj amaj kaj unu despera kanto*; kaj el la angla: de Ernest Hemingway *La oldulo kaj la maro*, de Robert Louis Stevenson *D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde*. Sten Johansson tradukis el la sveda la libron de Selma Lagerlöf *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson*, kaj Gaston Waringhien el la persa de Umar Kajjam *La Robaioj* ktp ktp ktp.

Ni ne forgesu pri didaktikaj verkoj, speciale *Gerda malaperis!* de Claude Piron kaj pluraj aliaj.

Tra la jaroj *Fonto* foje kompostis librojn, kiuj aperis sub aliaj “markoj”. Gersi Alfredo Bays ja disponis pri bonegaj aparatoj por komposti kaj produkti librojn. Pluraj laŭdis lian aglokulan fidecon. Tiel li zorgis pri vere fakula aspekto de pluraj eldonaĵoj de aliaj eldonejoj. Ni pensu pri UEA kaj la epokfara 4a eldono de *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien, kelkaj numeroj de *Literatura Foiro*, *La Eta Princo* (Kanada Esperanto-Asocio, 1984), kelkaj libroj por la eldonisto Haupenthal (la plej konata: *La Litomiŝla Tombejo*), tre multaj libroj de la Eldonejo Lorenz (Brazilo), libroj kaj vortaregoj de Brazila Spiritisma Federacio kaj de VoKo (*La Praevangelio laŭ Jakobo*, *Beatrijs: Mezepoka Nederlanda Legendo* kaj Erasmo de Roterdamo *Antaŭparoloj al la Nova Testamento*).

La eldonisto Gersi Alfredo Bays ricevis la premiojn Grabowski kaj FAME.

La revuo ĉesis aperi, sed ĝi plu estas disponebla “papere” kaj ankaŭ (plena kolekto) en disko. La eldonejo mem ankoraŭ plu agadas.

Gerrit Berveling
Gersi Alfredo Bays



Usonano

de Arkadij Averĉenko

En tiu loko la rivero havis sinuon, tiel ke estiĝis kvazaŭ duoninsulo.

Elirinte el la arbar-densejo kaj ekvidinte malproksime brilantajn en la sunlumo riverpecojn, disigitajn fare de siluetoj de arbotrunkoj, Strekaĉov transmetis la fusilon sur la alian ŝultron kaj per poŝtuko viŝis la ŝviton de la frunto.

Kaj tuj li trafis variolmarkitan viraĉon, kiu sidis sur la stumpo de faligita arbo, profundiĝinte en la legadon de iu ĵurnalpeco.

La viraĉo, aŭdinte paŝojn, flankenmetis la ĵurnalon, levis sur la fronton siajn grandegajn okulvitrojn kaj, detirinte de la kapo senforman kaj strangaspektan ĉapelaĉon, klinsalutis Strekaĉovon.

— Salut’.

— Saluton, amiko. Devojiĝis mi, ŝajne.

— Kaj kie vi loĝas?

— Mí somerumas. En Ovsjankino. Tie mi loĝas.

— Je ĉirkaŭ ok verstoj de ĉi lok’...

Li atente ekrigardis la lacan ĉasanton kaj demandis:

— Ĉu io necesas al vi?

— Kio?

— Nu, povas esti, via moŝto deziras ion, do mi havas.

— Sed kio vi estas?

— Terluisto, — grave respondis la viraĉo, tretinte de unu piedo al la alia.

— Ĉu ĉi tiun terenon vi luas?

— Ĝust’ tiel.

— Kaj do, ĉu vi grenon semas ĉi tie?

— Ja kian grenon, via moŝt’! Eĉ ne pensis mi pri greno. Ĉi tie nur aĉaĵoj kreskas — nek arbo taŭga, nek herbejo uzebla troveblas. Ĉie nur tempest-rompaĵoj, trunkoj falintaj kaj arboj sekaj.

— Kaj, do, ĉu vi ĉi tie... fungojn kolektas, berojn?

— Ne estas ĉi tie fungoj bonaj. Kaj ankaŭ la beroj, preterdire, taŭgas nur por la diablo.

— Jen strangulo, — miris Strekaĉov. — Sed por kio tiam vi tiun terenon luas?

— Tamen, kiel diri, via moŝt’, ĉia tero estas donita al homo por iu celo, kaj se la kreskado ne okazas, do, kiel homoj diras, oni devas, se ne unumaniere, do alimaniere, sian profiton havi.

Tiun frazon kun nekaptebla senco la viraĉo elparolis tre serioze kaj eĉ glatigis per sia raspa mano sian tre maldensan barbon, aspekte similan al la morna “luita” tereno: nek haroj, nek glata loko — nur rompaĵoj kaj sekaĵoj.

— Do per kio vi vivas?

— Per somerumantoj mi min vivtenas.

— Do vi laboras por ili, ĉu ne?

La ruza rida rigardo de la viraĉo priserĉis la vizaĝon de la ĉasanto, kaj ridetaciis la viraĉo ruze, sed bonanime.

— Por kio mi laboru por ili! Ili laboras por mi.

— Ja mensogas vi, onklo, — malkontente murmuris la ĉasanto Strekaĉov, pendigante la fusilon sur la ŝultron kaj intencante foriri.

— Ne, mensogi ni ne povas, — kontraŭis la viraĉo. — Por kio mensogi! Pro tio oni ja ne laŭdas! Ĉu vi inojn ŝategas?

— Kion?

— Iuj de nia sekso mirinde ŝatas la virinojn.

— Kaj?

— Do, mi okupiĝas, por tiel diri, ĝuste pri la virina sfer’.

— Kiun?!!

— Ja tion ni tuj diros al vi — kiun...

La viraĉo elprenis el la sino arĝentan horloĝon, malfermis ĝin kaj,

proksimiginte ĝin al siaj okuloj, enpensiĝis. Li longe cerbumis pri io.

— La edzino de Ŝestakov, devas esti, malsanas nun, ĉar kvin tagojn ne estas vidata, do, kion ni nun havas? Tiel, mi pensas, nun estas la temp’ por somerumantoj Maslobojevoj kaj Ogrizkinoj. La Maslobojevoj, krom la guvirmistino, al vi neniel utilas, ĉar la mastrino mem estas maldika, kiel stango, dum la filinoj estas tiel junaj, ke eĉ ne meritas atenton. Male, pri sinjorino Ogrizkina vi tutcerte kuntentos. Ŝi estas virino en plena bel-eco, kaj pere de la servistino Agaŝa bankostumon subĵetis mi al ŝi tian, ke donu ĉion — kaj eĉ tio ne sufiĉas. Pli frue ŝi ja portaĉis ion tian, ke eĉ ne kumpreneblas kion: ĉu estis kaftano plisita, ĉu kvazaŭ palto. Sed se ne stringas — miaj sinjoroj treege malkuntentas. Ne intiras, jen kiel! Sed ĉu mi kontraŭas?.. Se decidus mi, do sen ĉio, kiel oni diras. Ili ja perdus nenion, ĉu ne? Ĉu mi pravas?

— Nur diablo komprenas, pri kio vi parolas, — incitiĝis la ĉasanto.

— Efektive, — konsentis la viraĉo. — Vi ne kumprenas, ĉar vi loĝas malproksime, sed niaj viroj de Okromĉedelo neniam min forgesas. “Jeremej, ĉu estas io nova? Jeremej, ĉu freŝiĝis la ripertuaro? Ja mi, povas esti, deziras vidi ĉi tiun, kaj tiun ne deziras, kaj kien malaperis tiu, kaj kion faras ĉi tiu?” Unuvorte, mi estas ĉe ili la plej grava person’.

— Ĉe kiu?

— Ĉe la somerumantoj.

— Ĉu ĉe tiuj, trans la rivero?

— Kial ĉe tiuj? Se tiuj eksciis — ili bategus min tiel, ke ĝis la fino de l’ mond’ ne forgeseblos. Sed mi ja parolas pri okromĉedelovanoj. Ĉi tie, trans tiu monteto, estas ĉirkaŭ cent somerdomoj. Do mi profitas de ili.

— Ja kiel vi profitas, pajaco?!

La viraĉo gratis la nukon.

— Ja kia vi estas nekomprenanta! Kiel kaj kion... Sufiĉas sidigi sinjoron en kavon — kaj jen, ĝuu la vivon. Rigardu certe, por kio pagendas. Por sinjorino Ogrizkina mi, amiko, prenos ne malpli ol rublon. Ankaŭ la junulinoj de Ŝesterenko — ĉiun guston kontentigos — ĉu estas peko preni unu rublon kaj kvaronon kontraŭ tia vidaĵo? Sinjorino Drjagina, Semenenko, Kosogorova, Laki-na... Ĉu malmultas?..

— Do, ĉu vi, — divenis Strekaĉov, — baniĝantinojn montras sur via tereno?

— Ĝust'! Tiu bordo, do, estas ilia, kaj ĉi tiu, do, estas mia. Ili nenion perdas, sed mi profitas.

— Jen kanajlo, — ekridis Strekaĉov. — Do kiel vi inventis tion?

— Ja dependas, sinjoro, kiu kian cerbon de la Dio ricevis... Jen mi iras lastjare al la rivero fiŝkapteti kaj vidas: kia mirindaĵo! Sub unu arbusto somerumanto blankas, sub alia arbusto somerumanto blankas. Kaj el ĉiu okulparo pintas binoklo. "Ĉu ili frenezigiĉis ĉiuj?" — mi pensas. Tiam mi ja pri binokloj eĉ ne aŭdis. Nu, mi iras, do, pli proksimen al la rivero... Ehe, mi vidas. Jen je via dispono kaj brunulinoj, kaj blundulinoj, kaj dikaj, kaj magraj, kaj maturaj, kaj junaj. Jen kio! Nu, kiam, do, mi plensature sur la bordo aperis — ili tuj ekŝriakis: "For, fiulo, for, aĉulo, kiel vi aŭdacas!" Kaj ekblekadis! De tiam mi do ĉion cerbkomprenis klare.

— Kaj, do, la terenon vi speciale luis?

— Speciale. Sesdek rublojn por la somero fordonis. Ĉu ne lerte? Kaj kvar binoklojn mi mendis, kaj arbustojn plantis, kaj kavojn elfosis — jen kumforto unuagrada. Oni sidas, do, en malvarmeto, en kavoj sur benketoj, maldekstre estas botelo da biero (mi mem ofertas: eble vi deziras? Nur kvarono da rublo), maldekstre, do, da biero botelo, dekstre cigaredoj... — ne vivo, sed plezuro!

La ĉasanto Strekaĉov frapetis per la fusilo je pendanta arbobranĉo kaj kvazaŭ preterpase demandis:

— Ĉu bone videblas?

— Ja se kun binoklo, do kvazaŭ tuj apud — mandistance! Kaj kiu binoklon inventis, — munumenton li meritas!.. Eble, vi bonvolus provi?

— Nu, kion vi diras, — konfuzite ridetis la ĉasanto. — Kaj se ili min rimarkos de tiu bordo?

— Neniel tio eblas! Ĉar tiel mi ĉion aranĝis. Kvazaŭ arbusto; sed malantaŭ la arbusto estas kavoj, kaj en la kavoj benketoj. Kion do, sinjoro... provu. Nur (li levis la manon al la frunto kaj esploris rigardis la alian bordon, kie flavis la banejo)... nur rublo kaj sesdek kopekoj estas la negoco.

— De kie tiu kalkulo?!

— La kalkul' estas simpla, via moŝt': sinjorino Ogrizkina baniĝas nun — ili estas damo rimarkinda, bonvolu konvinkiĝi mem — rublo, kaj Drjagina kun la filino, dek kvin kopekojn mi petas, kaj ankaŭ neniel eblas gvernistino Lavrovskaja je malpli ol dudek kopekoj taksi. Kvank' ili estas gvernistino, sed neniel al nobelulinoj malsuperas. Bankostumeto estas tia, kvazaŭ ĝi entute forestus...

— Do, nu... vi... tion...

— Ĉi tien, via moŝt', bonvolu, jen du ŝtupetoj suben... Kaj tie ĉi la kapon vi klinu, por ke oni ne rimarku de tie. Jen tiel, bonvol'. Kaj nun vi povas aranĝi vin... Kial ne mendi biereton freŝan? Tuj-minute mi viŝos la binoklon, ja ĝi ial nebuliĝis... Bonvolu rigardi.

* * *

Krepuskis...

Laca kaj malsatiĝinta Strekaĉov elrampis el sia kaŝejo kaj, trovinte la fusilon, demandis la variolmarkitan viraĉon, dolĉe dormetantan sur faligita arbo:

— Kiom mi ŝuldas?

— Ses rublojn kaj dudek, via moŝt', kaj por la biero duonrublon.

— Ses rublojn kaj dudek?! Ja pro kio tia, do, tiom? Verŝajne, vi fraŭdas.

— Indulgu, kiel eblas, via moŝt'... Ni taksu sinjorinon Ogrizkina je rubl', kaj la gvernistino ĉe ni ĉiame duonrublon kostas, kaj Drjagina — kaj la etulinojn mi tute ne kalkulas — kaj la triopo de Sinjakovoj kun la avinjo, kaj...

— Nu bone, bone... Ja kian bagatelon vi kalkulas!.. Ricevu!

— Estu feliĉa! Mi humile dankas vian moŝton!..

Kaj, palpebruminte tre intime, la viraĉo flustris:

— Kaj en miaj tria kaj kvina numeroj de post la tagmezo sidas niaj, de Okromĉedelovo. Jam estas tute malmulte, sed ne eblas elpeli ilin. Gajuloj, donu Dio sanon al ili. Feliĉon al vi!

Tradukis el la rusa

Anna kaj Mati Pentus

Laŭda mencio en Liro-2010.



Grigorij Arosev

PAPILIOJ

*Kiam ni fariĝos papilioj,
ni evitos retojn de kaptiloj.
Ŝvebos ni en ombroj de tilioj,
tre diverskoloraj kaj subtilaj.
Ni okazos samaj kaj aliaj,
estos ni damaĝaj kaj utilaj
kiam ni fariĝos papilioj,
kiam ni fariĝos papilioj.*

*Kiam ni memoros la futuron,
vintro cedos lokon al somero.
Ni kuraĝe planos forveturon,
esperante je duonlibero,
sed verŝajne ni alfrontos muron.
Vi ne ŝatos guston de ĉi bero
kiam ni memoros la futuron,
kiam ni memoros la futuron.*

*Kiam venos tempo rekomenci,
perke gliti preter seĝoj, retoj,
ni ne plu scipovos pacienci,
hake iri tra tabuoj, vetoj,
Dio nin konjektos rekomenci,
sendepende de senditaj petoj.
Kiam venos tempo rekomenci,
ni fariĝos simplaj ventblovetoj —
kiam venos tempo rekomenci,
kiam venos tempo rekomenci.*

Laŭda mencio en Liro-2010.



Inter finvenkismo kaj raŭmismo

Gonĉarov, Anatolo. *Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj*. Thaumiers: La KancerKliniko, 2010. — 24 p.

La celo de la intelekta ekzerco de Anatolo Gonĉarov estas kolekti citaĵojn de konataj opiniantoj de la Esperanto-movado “pri la problemoj de Esperanto” kaj raŭmisme komenti ilin. La citaĵoj estas ĉerpitaj precipe el kvazaŭ-oficialaj periodaĵoj kiel *Literatura Foiro*, *Esperanto*, *La Gazeto*, *El Popola Ĉinio*, *Fonto*, *La Ondo de Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, en kiuj aperis diverstendencaj artikoloj pri motivado kaj identeco de esperantisto kaj karaktero de la Esperanto-movado.

La prezenton de citaĵoj uverturas la svisa eksinterlingvisto Tazio Carlevaro, kiu diagnozis el la vidpunkto de profesia psikiatro, eble ne sen humuro, sed verŝajne ankaŭ tute serioze, ke en la kazo de la esperantistoj temas pri speco de frenezuloj, psikopatoj kaj ksenoglotuloj; kiel konsolon li aldonis, ke esperantistoj ne estas la solaj tiaj, sed psikologie kompareblaj kun lingvistoj, poetoj, aŭtoroj de teatro, ktp. Sekvas eldiro de Trevor Steele, kiu ĝojas, ke li havas la privilegion troviĝi inter esperantistoj, kiujn li konsideras la elito de la homaro, dum Giorgio Silfer konsideras Esperanton eĉ kiel solvon de la lingva problemo. Claude Piron opiniis, ke Esperanto estas bona lingvo, ĉar ĝi solvas komunikproblemojn en psike pli sana maniero ol la angla tion faras. Daniele Vitali aliĝis al la Esperanto-movado, ĉar li komprenis, ke li eniris plaĉe utopian mondon. Por Eli Urbanová esperantistoj estas kvazaŭ unu familio, por Edgar de Zilah eĉ io pli alta. Por Nikolin la malkovro de Esperanto respondis al iu persona bezono. Giuseppe Vallente eĉ sentas sin proprahejme en Esperantio, ĉar tiu hejmo peras varmecon, kiel konfirmis en tiu vico alia esperantisto. Iu ĉina samideano skribis, ke Esperanto estas komunikilo por kultura interŝanĝo. Jen la esenco de la unuaj 11 citaĵoj. Sekvas aro da similtipaj pledoj, kiuj probable taŭgas por La Kancerkliniko, sed apenaŭ por la serioza Esperanto-propagando. La troigitaj konsideroj pri Esperanto kulminas preskaŭ patologie en la konfeso de Gonĉarov, ke li “sufervis” je la malsano “esperantozo”, ĉar tiom fanatike li okupiĝis pri ĝi. Por Baghy (1966) esti esperantisto signifis kvazaŭ denaskan destinon. Tomasz Chmielik interpretas la esperantismon kiel diasporan fenomenon kaj komparas ĝin kun la sorto de la judaro, kiu longe vivis en diasporo. Laŭ Carlo Minnaja Esperanton savis la “interna ideo”. Dank’ al Esperanto Walter Ŝelazny en la 70aj jaroj trovis kelkajn amikojn. Laŭ Ulrich Lins (1986) la granda plimulto de la esperantistoj ĉiam opiniis, ke Esperanto simbolas la naturan sopiron de la homaro al paco. Ktp.

Ĉiuj ĉi iom ridindaj frazaĵoj kontrastas kun jena demando: Kial la mondo ĝin ne adoptis, se ĝi estas supera afero (de Zilah), unika fenomeno (MacGill), feliĉigilo (Hans Bakker), vivmaniero (Enderby), kultura identigilo (Silfer), ne nur lingvo sed komunumo kun difinita karaktero (Rátkai), vivanta lingvo de vivanta popolo (Duc Goninaz), finfine unika ekzemplo de praktika realigo de la eŭropa civitismo kaj sociokultura avangardo (Silfer), eĉ nacio (Karolo Piĉe)? Pro kio Esperantujo ne evoluas (Ŝelazny) kaj kial esperantistoj vivas ne nur izolite, sed socilime, do rande de la socio (Silfer) kiel efemera kuriozaĵo (dirus la recenzanto)?

Ne forgesu (re)aboni

Krom la litanio de fanfaronoj kaj fantazioj, kiuj havas sendube religiecajn, sektemajn trajtojn, reprezentigas inter la citaĵoj ankaŭ pli raciaj voĉoj, precipe en la dua parto (mankas sistemigo laŭ temoj kaj eble ankaŭ laŭ jaro de la farita eldiro).

Ekzemple Willem Verloren van Themaat kredis, ke la diasporo de Esperanto ne plu sufiĉas, se Esperanto volas solvi la mondan lingvan problemon. Valdas Banaitis observis, ke novaj Esperanto-kursoj nutras nur amatoran movadon, subtenas ĝian vegetadon, sed ne antaŭenigas Esperanton en ĝia internacia, interlingva kaj propedeŭtika roloj. Trevor Steele plendas pri tro da komencantoj dum la meza nivelo mankas, kaj Valentin Melnikov spertis, ke post la fino de la elementaj kursoj nur tre malmultaj personoj restas aktivaj en la Esperanto-medio. Ĉe preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kiujn Claude Gacond renkontis, konstateblis preskaŭ absoluta sci-vakuo pri la Esperanto-kulturo. Plej radikale sin anoncis Georgo Kamaĉo, kiu konfesis (2002): “Mi emas kabei ... Perdiĝis la emo iri al kongresoj, kie post kvinjara partopreno oni renkontas konstante la samajn vizaĝojn, la samajn gurditajn temojn.” Pro tio li simple “fajfas pri la sorto de niaj institucioj aŭ pri la estontado de nia lingvo.” Gonĉarov lasas ĉi tiun citaĵon sen komento. Ankaŭ Gonçalo Neves forlasis la Esperanto-movadon, sed restos interesata pri planlingvismo. Alian ekstremon de esperantisteco reprezentas Renato Corsetti, kiu kiel konvinkita praelano, laŭ propra klarigo, estas relative indiferenta je la komunumo de Esperanto-parolantoj kaj de la kulturaj kaj literaturaj valoroj kaj anstataŭ tio ĉefe celas disvastigi Esperanton kiel rimedon por interkompreniĝo inter neesperantistoj. Miroslav Malovec eĉ vidas en la finvenkismo la plej grandan obstaklon al la disvolviĝo de Esperanto, ĉar ĝi implicas koncepton de altrudo. Laŭ Kalle Kniivilä la mondo vere aŭskultos nin nur se ni havos ion valoran por diri. Pola Studenta Esperanto-Komitato postulis jam en 1983, ke la esperantistoj devas starigadi antaŭ si celojn realigeblajn en la daŭro de 10-15 jaroj kaj altigi la kvaliton de la Esperanto-kulturo. Bertil Englund preferas limigitan nombron de bone parolantaj individuoj ol amase balbutantaj eternaj komencantoj, kaj Nikolao Gudskov entute kredas (1994), ke la fina venko ne eblas. Fine Esperanto estas ne pli ol minoritata lingvo (de Seabra) kaj ĉio mankas al ni por formi nacion (de Zilah).


Kiel adepto de la Esperanta Civito, kiu laŭ Jouko Lindstedt ne estas serioza afero, Gonĉarov ŝajnas apogi plimulte la fremdajn opiniojn kaj asertojn de li elektitajn, kiuj evidente formas la tutecon de lia persona mondkoncepto raŭmisma. Eĉ la kritikajn esprimojn li bonvenigas, ĉar ŝajnas, ke li subkomprenas ilin kiel admonon por plibonigi la situacion de Esperanto, kiun li mem konsideris senespera antaŭ ol li mem resurektis kiel esperantisto kadre de la Esperanta Civito. Povas esti, ke multaj esperantistoj vidas la aferojn same aŭ simile kaj konsentus pri multaj eldiroj en la 80 citaĵoj.

Per la prilaboraĵo de Gonĉarov la finvenkismo ricevis raŭmisman vizaĝon kaj la raŭmisma propagando novan pravigon. Ruza truko, kiun la ĉaŭdefonaj civitistoj certe aplaudos. Sed ĉu kun pura konscienco? En la kazo de la Gonĉarova ekzerco temas pri nenio alia ol la evidenta provo transformi finvenkistojn al raŭmistoj kaj uzurpi la tradiciajn finvenkismajn argumentojn por vendi ilin kiel raŭmismajn ideojn. Per ĉi tiu klopodo la antagonismo inter finvenkismo kaj raŭmismo ne nur atingis novan kulminon, sed estas ankaŭ definitive kondukita kvazaŭ al absurdo.

Andreas Künzli

Elegante levi piedojn

Cseh, Andreo. *Konversacia vortaro* / Red., enkonduko. Ed Borsboom. — 6a eld. — Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 2010. — 111 p., il.; 300 ekz.



La nomo *Konversacia vortaro* lasas supozojn, ke ĉi tiu libro proponas parolturnojn uzeblajn kaj necesajn por sukcese konversacii, kutimajn dialogerojn — kiel komenci interparolon, kiel enkonduki temon, kiel ŝanĝi al alia temo, kiel esprimi opinion, dankon, proponon ktp... Tamen en la libro surprize troviĝis nek tio, nek la alia. La libro entenas alfabetordan liston de vortoj kaj ties difinojn — kaj ĉi tie finiĝas simileco kun vortaro, aŭ kun tio, kion oni kutime

komprenas kiel vortaron.

Malgranda enkonduko prezentas historian informon pri la libro mem: la kvanton kaj cirkonstancojn de reeldonoj, krome la redaktoro Ed Borsboom donas klarigojn pri la aspekto (desegnaĵoj, kovrilo) kaj la enhavo (vorttrezoro, modifo de kelkaj lingvaj momentoj). Verŝajne, ĉiu esperantisto, kiu iam partoprenis Ĉe-kursojn, scias, pri kio temas en kazo de *Konversacia vortaro* — temas ne pri vera vortaro, sed pri kolekto de (ofte ŝercaj) difinoj de vortoj, kiujn dum lecionoj laŭ Ĉe-metodo naskis la lerngrupo. La redaktoro citas vortojn de Andreo Cseh el la unua eldono: “La libreto volas esti nur modesta memoraĵo pri la horoj de la konversacioj”.

En la 6a eldono troveblas ŝanĝoj — la kvanto da vortoj kreskis de 479 en la unua eldono ĝis 613 en la nuna. Hazarda listo, aperinta pro la ŝato de Andreo Cseh skribfiksi apartajn difinojn (do, ne temas pri sistema aliro), estas nun plenigita per kelkaj novaj radikoj, uzataj de modernaj Ĉe-instruistoj, kaj per necesaj Esperantaj vortoj el modernaj presaĵoj. La ilustraĵoj de Jesse van Dijl — novaĵo de la nuna eldono — realigas gajan spiriton de Ĉe-lecionoj kaj inter aliaj bildoj redonas tipe Ĉe-metodajn terminojn (ekzemple: *cinciminciĉurmur*).

Kiam klariĝas, ke la libro proponas materialon ne sciencokarakteran, sed ludan, vi povas trankvile ŝanĝi perplekson al ĝuo kaj bonhumore legi strangajn difinojn, kelkaj el kiuj jam vivas en la komunumo en formo de anekdotoj (ekzemple: elegante levi piedojn = *danci*). Aliaj difinoj montros al vi multajn nociojn en nova lumo, same kiel infana racio nove kaj neatendite interpretas malnovajn kaj jam delonge konatajn aĵojn.

Oksana Burkina

Kalle Kniivilä premiita

Kalle Kniivilä, la redaktoro de *Libera Folio*, 20 okt 2011 kune kun du kolegoj en la ĵurnalo *Sydsvenskan* gajnis la plej prestiĝan premion de la ĵurnalo *Nerikes Allehanda* pri loka ĵurnalismo en Svedio. La premio konsistas el 75 mil svedaj kronoj.

La premion oni aljuĝis pro artikolserio pri lernejo, kie okazis dum mallonga periodo multaj ŝanĝoj de instruistoj kaj lernejestroj. En la motivigo la ĵurio aparte mencias la fakton ke oni metis la lerneĵojn en la centron de la raportado kaj tiel igis la problemojn evidentaj. La lernejo fariĝis koncepto tutlande kaj la artikoloj kaŭzis realajn ŝanĝojn.

Laŭ *Libera Folio*

Poemoj de Maksim Bahdanoviĉ

Per la subaj tradukoj ni modeste kontribuas al la festado de la jubileo de Maksim Bahdanoviĉ, naskiĝinta antaŭ 120 jaroj, la 27an de novembro (Gregorie: la 9an de decembro) 1891 en Minsko. Dum sia nur 25-jara vivo, Bahdanoviĉ iĝis la plej brila tiuepoka belarusa poeto kaj tradukanto; oni konsideras lin kunfondinto de la moderna belarusa literaturo.

ROMANCO

*Quand luira cette étoile, un jour,
la plus belle et la plus lointaine,
dites-lui qu'elle eut mon amour,
o derniers de la race humaine!**
(Sully-Prudhomme)

*Stelo Venus' super tero aperis,
rememorigis pri fora tener'...
Kiam renkontis mi vin, same helis
stelo Venus' super ter'.*

*De tiu temp' kun fidel' mi rigardas
noktan ĉielon, serĉante je l' stel'.
Amo kvieta al vi flagre ardas
de tiu temp' kun fidel'.*

*Tamen disigas nin sort' kaj destino;
mi ne revidos vin, certe, ĝis mort'.
Firme mi amis vin, ho karulino,
tamen disigas nin sort'.*

*Sur malproksima teren' mi sopiros,
amon kaŝinte en kor' kun ĉagren'.
Ĉiuvespere la stelon admiros
sur malproksima teren'.*

*Vidu ĝin foje kun trista silento, –
niaj rigardoj kuniĝos en dist'...
Ke reviviĝu la am' por momento,
vidu ĝin foje kun trist'...*

ROMANCO

*Ne alportas kvieton la tago, nek nokta obskur',
ja per flamo infera bruligas min am' en tortur'.
Sed konatas ja: por ke mildiĝu dolor' en brulvund',
vi almetu malvarmon, plej bone konvenas la grund'.
Do pacigu min, tero humida, enprenu vi min
por estingi suferojn kaj revojn pri la amatin'.*


TRIOLETO

*Rigardis foje mi al sun',
nun la okuloj ne plu vidas.
Sed mi l' eternan nokton spitas –
Rigardis foje mi al sun'!
Kaj, kvankam ĉiuj min priridas,
mi la respondon donas nun:
Rigardis foje mi al sun',
nun la okuloj ne plu vidas.*

Tradukis el la belarusa Valentin Melnikov

* Kiam ĉi stel' en firmament' ekbrile sendos puran flamon, vi, lastaj el la homa gent', ne plu sekretu mian amon. (Traduko de Michel Duc Goninaz)

Kvar novaj diskoj en Esperanto




La dua hiphopa...

Jen hiphopa kompilo centprocente en Esperanto. Simile al uzantoj de la internacia lingvo, la artistoj estas disaj tra la tuta planedo. Partoprenis produktistoj, repistoj, kantistoj, kaj muzikistoj el deko da landoj: Germanio (Jonny M.), Brazilo (Tone), Kanado (Diablo), Danio (Bugge Bang), Finnlando (Dolchamar), Francio (La Pafklik), Japanio (Eterne Rima), Slovakio (Marteno), Svedio (Carina), kaj Svisio (Tinitus)!

Male al la unua hiphopa kompilo, lanĉita en 2009, kiu estis eksperimentaĵo, la dua estas profesie produktita kaj prezentas konfirmitajn artistojn kiajn Eterne Rima kaj Platano de *La Pafklik*, kiuj ambaŭ eldonis antaŭ nelonge siajn proprajn albumojn, sen forgesi *Dolchamar*, kiu venas el la poproka universo, sed kiu estis la unua bando kiu repis en Esperanto.

Muzikaĵoj de la kompilo estas tre diversaj, irante de klasika novjorka hiphopo (*Lasta kanto* de Platano), viglaj kantoj (*Diru mi nun* de Jonny M.), pop-rok (*Tritaga afero* de Dolchamar), ĝis ornamaĉa dirty-south (*Fidela* de Eterne Rima).



Same kiel en ĉiuj rep-kompiloj, tiu ĉi enhavas eksperimentojn kaj neelpensiblajn kunlaborojn inter la artistoj en vera internacia etoso.

Jam la sesa albumo de Kajto

Jen la sesa Esperanto-albumo de *Kajto*, unue prezentita en la Kopenhaga UK en julio 2011. Nun, *Kajto* ekzistas kiel duopo Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer, kiuj kune faris ĉi tiun albumon *Duope*, denove montrante bonkvalitan laboron, kiel ili ĉiam faris.

La nova albumo proponas 14 novajn titolojn en Esperanto kun variaj ritmoj kaj etosoj laŭ la pop-folk-stilo kiu estas ilia. De la poezia *Surbordigitaj* al la ribela *Ne permesas Panjo*, aŭ de la amkanto *Mi estas Rozo* ĝis la abundeca *Rave kun vi*, jen riĉaj melodioj kaj belaj tekstoj, modestaj kaj gajaj, melankoliaj kaj humuraj.

Por akompani siajn kantojn, Nanne kaj Ankie uzas diversajn muzikilojn kiaj gitaro, mandolino, koncertino, kontrabaso, akordiono, banĝo, kaj zimbalo.



Amindaj debutas diske

La unua albumo de la grupo *Amindaj*, fondita en aŭgusto 2009 de Graciela Morgado Rodríguez, prezidanto de la Urba Klubo de Esperanto en Contra-maestre, estas ankaŭ la unua veninta de Kubo!

La grupo konsistas el junaj amatoroj kaj art-intruistoj, engaĝitaj en la Esperanto-movado, kiuj jam prezentigis sur diversaj scenejoj en Kubo, aparte dum la 95a UK kaj dum la 66a IJK en julio 2010 en Havano.

La ok kantoj de ĉi tiu albumo, ĉiuj en Esperanto kompreneble, estis elektitaj inter dudeko, plej multaj komponitaj de Julián Hernández Angulo en la varma kuba tradicio, kun violono, gitaro,

kontrabaso, marakoj, kubaj skrapiloj, guajo kaj guiro, kongoj, bongo, sonorilo, treso. Estas tamen kelkaj malnovaj kantoj, tradukitaj kaj adaptitaj de Mari-tza Gutiérrez, kiel la internacie konataj *Chan Chan* de Francisco Repilado (Compay Segundo), la *Son de la Loma* de Miguel Matamoros, kaj eĉ versio — laŭ kuba maniero — de *La Bambo*.

Amindaj en KD aŭ en koncerto kun du dancistinoj, Adita kaj Gricel, estas ne nur muzika grupo, sed ankaŭ kultura projekto vere malkovrinda.

Rêverie: dudiske dulingve

Dek titoloj por gustumi la belsoncon de Esperanto kaj dek titoloj en la itala, karakterizitaj pere de elvoka sono. Jen kion proponas *Rêverie*, profesia itala bando kreita en 1996 de la milana muzikisto, komponisto kaj gitaristo Valerio Vado.

Rêverie arte eksperimentas la uzon de pluraj lingvoj en siaj kantoj, inter kiuj Esperanto, la friula (grava regiona lingvo en nord-orienta Italio), la renesanca angla de Shakespeare, kaj kompreneble la itala.

Ĉerpante inspiron el la radikoj de la muzik-tradicioj renesanca kaj baroka italaj, eŭropa kaj mediteranea kulturoj, la fajna kunfandiĝo de tradiciaj kaj elektronikaj sonorecoj atingas sonon kiun *Rêverie* difinas kiel “etno-progresivan”, kreante propran etoson kortuŝanta ĉiujn generaciojn kaj sentemojn.

De vojaĝoj de tuaregaj komercistoj ĝis senlimaj horizontoj de la silkovojo, de la ruĝaj sunsubiroj sur la arbaroj de la granda Nordo ĝis la oceanaj profundoj, ĝi estas odo al la bezono de la homa spirito vaste iradi kaj ĉiam serĉi novajn horizontojn.


Mendu ĉe *Vinilkosmo*:

<http://www.vinilkosmo.com/>

Elŝutu (mp3, ogg) en la elŝutservo:

<http://www.vinilkosmo-mp3.com/>

Ĵo!



Belartaj konkursoj de UEA en 2012

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 63a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 97a Universala Kongreso en Hanojo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibro de la Jaro.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita;

Prozo: maksimuma longo 200×65 karaktroj (kvino da paĝoj);

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita;

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (Esperanto — ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo), proksimuma longo 400×65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas “Luigi Minnaja”;

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2011. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn — en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo Infanlibro, kiujn oni devas havigi en kvar ekzempleroj — oni sendu al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio aŭ prefere rete al: michela.lipari@tiscali.it, indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de marto 2012.

Premioj: unua premio 250 eŭroj, dua premio 175 eŭroj, tria premio 100 eŭroj; Nova Talento 175 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 525 eŭroj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA kaj legeblas ankaŭ ĉe:

uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_reguluro.html.

GK UEA

Ricevitaj libroj

Cseh, Andreo. *Konversacia vortaro* / Redaktis, enkonduktis. Ed Borsboom. — 6a eld. — Hago: IEL, 2010. — 111 p., il.; 300 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Gvidlibro 2011 / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2011. — 96 p., il. — [Donaco de UEA].

Hauptenthal, Reinhard. *EKRELO: Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo: Ein Verlag, seine Bücher und ihr Standort = Eldonejo, ties libroj kaj ilia trov-loko*. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2010. — 39 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; Heft 20). — [Donaco de Edition Iltis].

Strugackij, Arkadij; Strugackij, Boris. *Fabelo pri la triopo*: [Romano] / Tradukis el la rusa Mikaelo Bronŝtejn. — M.: Impeto, 2010. — 192 p.; 500 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Sveinsson, Sigurbjörn. *Blondulo*: Fabelo / Tradukis el la islanda Hallgrímur Sæmundsson. — Garðabær: Hallgrímur Sæmundsson, 2007. — 48 p., il. — [Donaco de Hallgrímur Sæmundsson].

Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo / Redaktis Andrzej Grzębowski. — 2a eld., kor. — Bydgoszcz: Skonpres, 2010. — 16 p. — [Donaco de ISTK].

Ricevitaj gazetoj

EAB Update, 2011/55; Esperanto aktuell, 2011/5; Esperanto*Info, 2011/1; Esperanto, 2011/10; Ĝenerala Informilo, 2011/167; KAE-Infomilo, 2011/76; Kataluna Esperantisto, 2011/357; Kontakto, 2011/4; La Lanterno Azia, 2011/10; La Movado, 2011/726; La Ondo de Esperanto, 2011/11; La Sago, 2011/76; Monato, 2011/10; REGo, 2011/5; Tempo, 2011/111; Verda Saksofono, 2011/30.

La abontarifo

**de La Ondo de Esperanto en 2012
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

La Verko de la Jaro: Kandidatoj

Ok poeziaj libroj kandidatas por la ĉi-jara PEN-premio *La Verko de la Jaro*.

La membroj de Esperanta PEN-Centro havis la eblecon selekti inter ok titoloj la librojn, kiuj eniros la kandidatliston por la La Verko de la Jaro 2011, kiu rilatas al la poezio eldonita dum la ĵusa jarduo.

Ok titoloj ricevis la necesan minimuman subtenon de almenaŭ tri PEN-anoj, laŭ la alfabeto ordo:

- *Epizodoj* de Lode Van de Velde
- *Esperanta versado* de Jaroslav Krolupper,
- *Kardo sur kasko* de Ivaniĉka Maĝarova,
- *La fontoj nevideblaj* de Baldur Ragnarsson,
- *La silika hakilo* de Jorge Camacho,
- *Orgeno* de Miĥail Ŝĉerbinin,
- *Poemoj pri diversaj universoj* de Sébastien Garant
- *Rudimentaj momentoj* de Lilia Nikolova.

En la decembra numero 254 de *Literatura Foiro* aperos la voĉdonilo kaj la abonantoj de la revuo referendumelektos. La voĉdono daŭros ĝis 30 apr 2012. Sekretario de la PEN-premio estas Milena Makaveeva.

La ricevinto(j) de la PEN-premio *La Verko de la Jaro* rajtas restadi en la verkista domo en Svislando, ĉe la Lemana Lago, ene de tri monatoj por krea laboro kaj feriado.

La PEN-premion *La Verko de la Jaro 2010* unuafoje gajnis komuna verko: la kolekto de rakontoj *Vizaĝoj*.

HeKo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por *Sudoku* el la aŭgusta-septembra *Ondo* venis 13 respondoj — ĉiuj estas tute ĝustaj.

7	8	2	5	3	1	4	9	6
1	3	9	6	4	7	2	5	8
5	4	6	8	9	2	1	3	7
9	1	5	3	7	4	6	8	2
3	7	8	9	2	6	5	1	4
2	6	4	1	5	8	9	7	3
6	5	7	2	1	3	8	4	9
8	9	3	4	6	5	7	2	1
4	2	1	7	8	9	3	6	5

Ilin sendis: Arayik Mnat-sakanyan (Armenio), Anne George, Malcolm Jones, Eric Smith (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Jackie Huberdeau (Francio), Edeltraut Henning (Germanio), Edith Schönwälder (Hispanio), Alexander Mikishev (Israelo), Gianfranco Vignando (Italio), Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Julia Sigmond (Rumanio).

La libropremion kaj niajn gratulojn ni sendas al **Eric Smith**.

Vidu la solvon ĉi-supre.

Malseka kulero de d-ro Zamenhof

Foje, dum Ludoviko Zamenhof komencis meti sukeron en sian kafon per kulerejo, lia edzino Klara diris al li:



— La kulerejo estas malseka, ĉi tial ne la tuta sukero falas el ĝi en la tason.

— Mi scias, — diris Doktoro Esperanto, — sed mi kirlas kafon per kulero metante sukeron lastfoje.

— Tiukaze, vi metas pli da sukero ol vi deziras, ja sukero gluiĝas ankaŭ al la dorsa flanko de la kulero.

Memkompreneble, mi opinias, ke vi ne intencis meti iom pli ol kuleron da sukero.

— Jes, mi deziras meti precize tiom da sukerkuleroj, kiom mi metas, kaj al mi bonŝancas fari tion.

Kiom da sukerkuleroj metis Zamenhof en sian kafon?

La respondo sendu al la redakcio poŝte aŭ rete tiel, ke ĝi atingu nin antaŭ la 10a de januaro 2012.

Aleksej Korĵenkov

Juda humuro

Nia popolo vivos eterne!

Joseph Goebbels, la nazia ministro pri propagando, vizitas lernejojn tra Germanio. En unu el ili li petas la lernantojn volontule diri patriotismajn sloganojn.

— Heil Hitler, — krias knabo.

— Tre bone, — respondas Goebbels.

— Deutschland über alles, — deklamas alia.

— Bonega, — reagas la ministro. — Nun io pli profunda, pli forta, pli potenca!

Tiam eta knabo levas sian manon. Goebbels petas lin paroli.

Diras la knabo:

— Nia popolo vivos eterne!

— Mirinde, — ekrias Goebbels. — Kiel nomiĝas la knabeto?

— Israel Goldberg, — la instruistino respondas.

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

La kaŝita vivo de Zamenhof

... ni intencas realigi ... filmon pri la vivo de L.L. Zamenhof ... Enhavo: ... Infaneco ... Adolesko ... Adulta vivo ... (imagufilmoj.wordpress.com/la-vivo-de-zamenhof, stato 11 nov 2011)

Künzli alfoje likos

Laŭ mi universitato en Esperanto estus ebla, sed nur sub kelkaj konkretaj kondiĉoj... pri kiuj mi eble ellasos min alian fojon. (Andy Künzli, 17 okt 2011, liberafolio.org/2011/ais-ne-arangos-ceestajn-studojn-en-2012#1318854710)

Mankas islama mistiko

Pietrzak komentas la kelkfojajn kritikojn, ke oni ne sufiĉe agas por persvadi EU pri la avantaĝoj de Esperanto... (Gazetara Komunikado de UEA n-ro 427, 10 sep 2011)

UK, ĉu urologia problemoj?

... la situacio restos kiel nun: ni renkotiĝas ĉiujare kaj dum unu semajno ĝentilumas inter ni. Mi ne interesiĝas pri la ĝentilumado inter ni en la UK. (Renato Corsetti, 13 aŭg 2011, yahoo-grupo komitato-de-uea, mesaĝo 6802)

Ne ŝovas nazon

UEA ne povas flari la enlandajn etosojn. (Mireille Grosjean, yahoo-grupo komitato-de-uea, 4 aŭg 2011, mesaĝo 6750)

Spica diskuto

Nu, mi kritikis Vian origanan aserton... (István Ertl: Ĉu la latina fiaskis?, 18 aŭg 2011, liberafolio.org/Members/Johan_Derks/rektavochdonado#1313697471)

Himno por la happy few

Leen Deij verkis interalie la versojn de la himno de SAT — kiun fakte konas nur la (eks)SAT-anoj flegantaj esperanton kiel kulturlingvon, do la raŭmisme orientitaj, kia estis Leen Deij mem. (Antologio de Leen Deij en Literatura Foiro // HeKo 487 5-B, 5 jul 2011, esperantio.net/index.php?id=1765)

Ĉu pagi por pavi, aŭ: Kaj kiu pavas?

... necesas pagi por la nomo "tejha.org"... mi ne diras, ke [la retejo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio] taŭgas nur por akcepti novajn membrojn. Eĉ se estus tiel, laŭ mi tio pavigus ĝian ekziston. (Mariana Evlogieva, 11 apr 2011, yahoo-grupo tejha, mesaĝo 579)

Madjaroj malmolaj

Dél-Dunántúli Regionális Eszperantó Alapítvány — HUNGARIO DURA. (esperanto-dombovar.hu, stato 11 nov 2011)

Plukis **István Ertl**

La Ondo invitas al kunlaboro en Mozaiko tiujn, kiuj povas kompili krucvortenigmojn, ŝaradojn kaj aliajn enigmojn. Ankaŭ pentristoj kaj karikaturistoj estas serĉataj. Skribu al ni rete: sezonoj@kanet.ru.

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest

KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano

Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa

Portugallio: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Ruslando. La Esperanto-kongreso en Ĉeboksary (vd. p. 6) kvante kaj kvalite restis en ombro de la samtempa 16a Lingva festivalo, en kiu, post kelkaj prezentoj ekster la ĉefurbo, estis prezentitaj 38 lingvoj kaj kelkaj lingvaj kaj naciaj asocioj. La prezentaĵoj alloĝis multajn junajn interesatojn. (Irina Jakovleva)



Germanio. 17 sep pli ol tridek membroj de la Esperanto-klubo en Munkeno festis la 120-jariĝon de la klubo kaj la 60-jariĝon de la urba Esperanto-placo per inaŭgura manifestacieto, kunsido, koncerto kaj komuna manĝo (kun festa trufotorto) en festa tendo starigita en la korto de *EineWeltHaus*. (Fritz Hilpert)



DR Kongo. La 28an de septembro en la TV-programo *On est ensemble* la prezidantino de la Konga Esperanta Virina Asocio (KEVA) Melly Masemi, prezentita kiel “Fraŭlino Esperanto” rakontis pri Esperanto, KEVA, kaj fine alvokis ĵurnalistojn kaj ĵunulojn lerni Esperanton. (Vanessa Kapenga)

HISTORIO

DE ESPERANTO




Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
360 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo